

El Popolo Ĉinio



人民中國報道



2

1959

ELDONAS: ĈINA ESPERANTO-LIGO






LA TUTA ĈINA POPOLO KLOPODAS POR PLIPRODUKTO DE ELEKTRO

por kontentigi la kreskantan bezonon de elektro sekve de la impeta disvolvo de industrio.

1. La moderna Harbin-a Generatorfabriko provizas ankaŭ 50000-kilovatajn generatorojn.
2. La granda Hidroelektra Stacio de Hingan-rivero komencos produkti elektron en 1959 anstataŭ en 1961.
3. Rapide konstruiĝas nova termoelektrejo en Ŝenjang.
4. La Dua Termoelektrejo de Baŭtoŭ jam komencis provizi elektron al la nova ferstala bazo de Baŭtoŭ.
5. Nova termoelektra vagonaro enviciĝas al la industria fronto.

(Daŭrigo sur p. 71)



Por vivo riĉa kaj diverskolora

EN la popolaj komunumoj de Pi-gubernio en Siĉuan-provinco oni bone aranĝis en oktobro 1958 la publikajn manĝejojn, sed samtempe konservis ankaŭ la kuirilojn en la hejmoj de kamparanoj, la restoraciojn, vin- kaj te-trinkejojn kaj diversajn manĝaj-farejojn en la vilaĝoj. Plie ili estas rearanĝitaj, pliperfektigitaj kaj plidisolvitaj por diversmaniere kontentigi la bezonojn de la membroj de la komunumoj, ke ili vivu en abundeco kaj varieco.

Laŭ nekompleta statistiko, la tuta gubernio ĝis novembro de 1958 starigis aŭ pligrandigis pli ol 40 malgrandajn fabrikojn de spicaĵoj, brando, sukeraĵoj, kukoj, faruno kaj similaj. Antaŭe en la tuta gubernio troviĝis nur unu fabriko de alkoholaĵo, kaj oni devis transporti grandan kvanton da brando al Pi-gubernio de aliaj lokoj por konsumado. Nun nove

fondiĝis en tiu gubernio pli ol 20 tiaj fabrikoj, kiuj produktas ĉiumonate 75,000 kilogramojn da brando kio estas pli ol sufiĉa por loka konsumado. Eĉ la fama loka produkto pi-brando netrovebla jam de pli ol 20 jaroj, nun reproduktiĝis. Alia manĝaĵo "fabo peklita kun kapsiko", estas la plej ŝatata de la lokaj kamparanoj. Nun estiĝis 3 ĝiaj novaj specoj. Ankaŭ la restoracioj, vendejoj de alkoholaĵoj kaj bufedoj en la vilaĝoj plimultigas je speco kaj varieco siajn vendaĵojn. Krome, estas organizitaj multe da cirkulantaj servo-grupoj por vendi brandojn, manĝaĵojn kaj kukojn en la publikaj manĝejoj.

Te-trinkejoj, ordinare estas ripozejoj por la lokaj kamparanoj. Nun ili estas plane translokitaj proksimen al la publikaj manĝejoj. Kelkaj el ili provizas ankaŭ librojn kaj ilustritajn gazetojn por la vizitantoj. Iuj eĉ organizas tie prezentadojn de teatraĵoj, kantoj kaj aliaj amuzaj programeroj. Tiamaniere la te-trinkejoj fariĝas jam "kulturaj ripozejoj".

Dank' al abunda provizo, la publikaj manĝejoj, sukcese pleje variigas siajn manĝaĵojn. Nun ĝenerale la manĝejoj provizas por ĉiu manĝo 3 specojn da manĝaĵoj vegetaraj aŭ viandaj kun unu supo. Ne malofte oni vidas, ke komunumanoj manĝas tie manĝaĵojn hejmfaritajn same kiel tiujn de la manĝejo kun bona apetito. En festotagoj, libertempoj aŭ foirtagoj, la kamparanoj povas aĉeti malmulte-koste frandaĵojn de ili preferatajn. Ĉiuj restoracioj aŭ bufedoj tiam estas plenplenaj de vizitantoj kaj bolas tie ĝojaj babiloj. La komunumanoj ofte diras: "Pli kaj pli boniĝas la vivo kaj pli kaj pli grandiĝas nia entuziasmo por produktado."

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 2 (53), 1959

Bildo sur la kovrilo — Riĉa Vivo (Lignogravuraĵo de Li Kjun)

En lando de poezio

Kinghaj — loko aminda

Grandaj produktajoj per malgrandaj maŝinoj

La Verda Granda Muro

Scianto de birdlingvo

Nove interkonataj kamaradinoj

Printempa orkideo

Filatelio en Ĉinio

Kin-imperio

Kurso de ĉina lingvo

Bildo sur la dorsa kovrilo — Respondi al la konkursa defio (Pentris Song Gong-juan)





En lando de poezio

Li Ĉeng

Ne vanas la nomo "Kulturo"

Nia aŭto atingis la celitan lokon — Kulturo-hiang, kiu troviĝas en la distrikto Huangšan de Ĉaŭ-gubernio, Anhuj-provinco. Tie fondiĝis lastatempe popola komunumo.

Elaŭtiĝinte ni tuj trovis nin en lando de poemoj kaj pentraĵoj, ĉar antaŭ kaj malantaŭ domoj, en kaj ekster la vilaĝo, ĉie sin trovas belaj versaĵoj kaj ĉarmaj bildoj. Se oni ne profunde informiĝus, oni tute ne kredus, ke tiuj ĉi estas verkoj de ordinaraj kamparanoj. Permesu al mi citu iujn el la poemoj, kiuj vin mirigos kaj ĉarmos. Lastan someron, en tiu regiono pluvo mankis dum 105 tagoj. Tia sekeco certe estus kaŭzinta teruran suferegon en la pasinteco, ne nur mankus la rikolto, sed eĉ la trinkakvo. Sed sub gvido de l' Kompartio, la loĝantaro energie luktis per senĉesa klopodado, venkis la sekecon kaj fine ĝuis ankoraŭfojan riĉan rikolton. El ĉi-subaj poemoj oni povas legi, kian temperamenton kaj optimismon ili posedis:

Disige sternaĝas senfine l' Arĝenta Rivero,
Inter la Bovknabo kaj la Teksistin' en separo,
Elĉerpu ni l' akvon de sur la ĉielo,
Por ke l' geamantoj kunvivu de nun jam en paro.*

* Laktvojo estas nomata en Ĉinio la Arĝenta Rivero aŭ Ĉiela Rivero. Teksistino, nomo de la ĉefa stelo de la konstelacio Harpo (a.: Vega) estas nepino de la Ĉiela Direĝo kaj Bovknabo (nomo de la ĉefa stelo de la konstelacio Aglo, a.: Altair) ŝia amato. La Ĉiela Direĝo koleris ilian amon kaj separigis ilin trans la Ĉiela Rivero. Ili povas renkonti sin nur unu fojon ĉiujare je la 7-a tago de la sepa monato laŭ la lunkalendaro, tiam pigoj formas ponton por ili per siaj korpoj super la Ĉiela Rivero, laŭ ĉina mito.

*Torente elsuĉas ferdrakoj gigantaj
Ĝisfunde la akvon el ĉiel-rivero
Alvenas Vangmu** kun terur' ekdemandas:
"De kie vi venas? Pro kio — l' afero?"*

* * *

*Spaliras la akvaj ĉerpiloj sennombraj,
Suĉegas kaj tondras ĉiuj kvazaŭ tromboj.
Ĝisfunde sekigos jam ni la riveron,
Por kapti l' Drakreĝon el l' akva interno.
Kaj ĝin ni devigos akvumi la teron.
La kankrojn kaj krabojn*** ektrafu l' konsterno.*

Rilate al pentraĵoj la ofte renkontataj kolorbildoj estis tiuj temantaj pri monttranslokigo de "Malsaĝa Avo†", "Lukto kontraŭ tigro de Vu Song††" ktp. Tio manifestas, ke la kamparanoj deziregas transformi la naturon kaj konstrui komunismon kun sama spirito de Malsaĝa Avo kaj braveco de Vu Song. Ie sur muro en pentraĵo, kiun akompanas versoj oni legis:

*Forpasis jam ĉiuj herooj estintaj,
Estas efektivaj nur la hodiaŭaj.*

Ekde la lasta majo, kiam tiu komunumo komencis kompanjon por likvidi la analfabetecon, estis establitaĵoj popolaj postlaboraj lernejoj en ĉiuj vilaĝoj, kaj nun jam malaperis la analfabetecon ĝenerale inter la membroj de la komunumo. Estis verkitaĵoj pli ol tri-cent mil poemoj en la daŭro de kvar monatoj de majo ĝis aŭgusto, kaj oni ankoraŭ pretis

** Nomo de Diino.

*** Drako estas reĝo de akvoj kun kankroj kaj kraboj kiel siaj militistoj, laŭ ĉina mito.

† Legu "Translokigo de Montoj" en n-ro 3, 1958 de EPC. p. 94.

†† Populara antikva heroo kiu mortbatis tigron.

verkadi por atingi la sumon de miliono da poemoj ĝis la jarfino. Estas vere lando de poezio, kaj ne vanas la nomo "Kulturo".

La viveca klasĉambro

Posttagmeze ni vizitis la ekspozician domon de la komunumo, kie ni vidis ĝian kvinjaran projekton (1958-1962). Laŭ la projekto la komunumo ne nur posedos 520 fabrikojn grandajn kaj malgrandajn, sed ankaŭ efektivigos la elektrigon, mekanikigon, plivastigon de la akvumata areo en agrikulturo, kaj disvolvon de bestbredado kaj arbokulturo. En la sfero de kulturo kaj klerigo estos establita 7 lernejoj mezgradaj kaj altgradaj, 70 infanĝardenoj kaj infanvartejoj, 6 teatroj kaj kinejoj, 1 kampara hospitalo k.t.p.

La ekspoziciaĵoj vive montris ankaŭ la kreskadon de la grenproduktado kun ĉiu jaro kaj la samtempan leviĝon de la vivnivelo popola. En la jaro 1962 la meznombra jara enspezo de ĉiu laborulo atingos 1930 juanojn. Tiu ĉi komunumo preparas sin en 1959 enkonduki la sistemon de salajrado, kaj laŭ la provizora projekto ĉiu laboranto ricevos monatan salajron de 33 juanoj, la plej malaltaj ricevos almenaŭ pli ol 15 juanojn. Kalkulante laŭ la monata vivkosto en kamparo de 5 juanoj eĉ al tiuj lastaj eblas vivteni po du familianoj. Estas ne mirinde, ke la modela bestbredisto Juan Ĉongŝeng, 67-jarulo ĝuanto de la 5 garantioj (t.e. manĝaĵo, vestaĵo, hejtaĵo, edukado kaj entombigo) diris kortuŝite post trarigardo: "Vivante en la malnova socio mi ĉiam preferis morti, sed nun — permesu min konfesi sentaŭgule — mi ja timas morti. Sub benado de Prezidanto Maŭ, pluvivu mi ankoraŭ plurajn jarojn por propraokule vidi la socion socialisman."

La Emociplena Momento

En Kulturo-ĥiang, ne nur abundas poemoj, sed ankaŭ popularas kantoj kaj dancoj. Tie kanti kaj danci scipovas pli malpli bone ĉiuj homoj, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu maljunuloj aŭ infanoj. Kie viglas laboroj, tie sonas ankaŭ kantoj. Jen karakterizaĵo de la loko. Tiun posttagmezon, mi vidis pli ol dek

bubojn ĥore kantantaj la kanton "Bonas la Socialismo". La plej aĝa el ili havas apenaŭ dek kaj la plej juna nur tri-kvar jarojn. Ni, ĉiuj estis ravitaj de ilia kantado tiel naiva kaj vigla. Ju pli ni aplaŭdis, des pli entuziame ili kantis. La kadroj de la komunumo konatigis al ni 60-jaran maljunulon, sarkantan en la kampo, dirante ke estas li kiu plej multe da kantoj verkis. Kaj ni petis lin kanti. Post momenta hezito pro modesteco li ekkantis:

*Kvazaŭ Ĝang Guolaŭ††† sur mola nubaro,
Gaje kantas mi, homet' kun blanka barbo.
Nu, demandi volas vi pri la kialo?
Ja pro la feliĉ' kreskanta jar' post jaro.*

En la vespero, la komunumo aranĝis speciale por ni amikan amuzvesperon. La allogaj programeroj, prezentitaj de la teatra trupo de la komunumo, multe interesis nin, precipe la kantoj de la "Avina Ĥoro" kaj la "Familia Ĥoro". En la programo troviĝis ĥorajo, danco, teatraĵo k.t.p., kiujn ĉiujn verkis la membroj mem de la teatra trupo. Krom ke la kostumo estas modesta kaj muzikiloj nemultaj, ĉio alia, nome enviciĝo, ĉef-

††† Unu el la Ok Dioj, kiu estas grandaĝa maljunulo, laŭ ĉina legendo.



Ni estas laborantoj kaj kantistoj

Lignogravuraĵo de Gu Juan

kantado, pozo, esprimo kaj tono de la ĥoro, estas komparebla kun profesia kanttrupo.

Speciale menciinda estas la "Avina Ĥoro", kies korifeo estas maljunulino de 56 jaroj, kiu laŭ onidiro, estas la malplej aĝa inter ili, kaj tial estas intime nomata de la aliaj fratinetoj. La vic-korifeo estas maljunulino de 78 jaroj. Kvankam ĉiuj ŝiaj dentoj jam falis, tamen ŝia voĉo estas longa kaj laŭta, kaj ne malpli bela ol tiu de junulinoj. Ĝuste kiel ŝi kantis:

*Kvankam restas al mi jam neniu dento,
Kantas mi fervore: "Ruĝas l' Oriento".*

Ili kantis por ni du popolkantojn sen ia direktado kaj akiris varman aplaŭdon. Pri tiu "Avina Ĥoro" jam raportis kun foto la Anhuĵ-a Bildgazeto. Kaj plurajn fojojn ili estis invititaj al la provinca urbo por tie kanti. Ili ĉie rikoltis respekton kaj admiron de la publiko kaj multe kontribuis al stimulado de la disvastigo de kantemo en Kulturo-hiang. Junuloj diris: "Vidu, eĉ la avinoj sin organizis, ĉu ni postrestu?" Kaj en malpli ol duona monato organiziĝis sinsekve kaj spontanee "Luo-ĉeng-a Ĥoro", "Huangĝong-a Ĥoro" k.t.p. nomataj laŭ legendaj herooj.

Ankaŭ la kantado de la "Familia Ĥoro" estas unu el la plej rimarkindaj programeroj en tiu vespero. La ĥoro konsistis el tri generacioj de la familio kun la avo kiel la unua kantisto, la avino kiel la dua. Kvankam la voĉoj ne estis altaj sed ili kantis nature, kuraĝe kaj energie. Komence ni tute ne preparis ian prezentadon, sed la mastroj post sia repertuaro insiste invitis nin al la scenejo, kaj tion ni ne povis rifuzi estante tiom emociitaj en la vespero. Feliĉe ni havis inter ni du diletantojn, ni sekve distris la publikon per kunkanto, kaj deklamo de poemo, improvizita por honori la komunumon. Kaj tio savis nin el la embaraso.

Nie Mei-ĉu :

KINGHAJ-

KINGHAJ-PROVINCO situas en la interna parto de Ĉinio. Oni rigardis ĝin kiel lokon tre malproksiman. Fakte ĝi estas tute facile atingebla nun. Por veni al Hining, ĝia ĉefurbo, de Langou oni bezonas malpli ol 50 minutojn per aeroplano, kaj malpli ol unu tagon per aŭtobuso. Kaj baldaŭ oni povas veturi tien rekte de Pekino per vagonaro.

Pri Kinghaj, oni emas ankaŭ imagi al si lokon dezertan. Fakte en Kinghaj troviĝas ne nur vastaj dezertoj kaj stepoj, sed ankaŭ agrikulturaj regionoj tute kovritaj de verdajoj. La aŭtovojoj kun altaj poploj vicigitaj ambaŭflanke estas tute kompareblaj al avenuoj de la nova Pekino. Kiam mi iris al Kinghaj ĉi-foje, estis ĝuste varmega ŝvitiga sezono en Pekino, dum en Kinghaj la vetero mildis kvazaŭ en majo. El la tritiko iuj jam oriĝis kaj aliaj estis ankoraŭ sukopleniĝantaj. La tigoj en la riĉ-produktaj kampoj de tritiko estis preskaŭ tiel dikaj kiel tiuj de fragmitoj. La freŝaj kaj junaj faboj kaj pizoj estis tiel grandaj, eĉ netroveblaj en varma suda Ĉinio. Estas bedaŭrinde nur ke mi ne venis ĝustatempe por gustumi la "ovo-abrikotojn", kiuj estis antaŭe loka tributo al la imperiestro, aŭ akvo-melonon, kiun oni manĝas ĉe forno.

Plej alloga tamen estas ĝia neelĉerpebla trezoro subtera. Oni nomas Kilian-montaron "ĉina Ural-o" kaj la Cajdam-basenon la "Bakuo de Ĉinio". Mi ne havas bonan kapon por ciferoj, sed rondvojaĝinte en Cajdam-baseno mi vidis propraokule kio estas "abundeco de naturaj riĉaĵoj".

Vojo el Salo

Sur la vojo de Taĉajtan, ĉefurbo de Cajdam-baseno, al petrolurbo Mangja, la aŭtobuso trakuras



Loko Aminda

kelk-cent kilometrojn ĉiam sur salo. Salo sub la piedoj, salo apud la vojo, salo ĉie kien oni povas atingi per la okuloj. La sala vojo surversita per sala solvaĵo brile glatas kvazaŭ asfaltita. Tamen tie la salo ne estas tre pura, ĉar en ĝi miksiĝas multe da gipso kaj sodo. Kiam oni atingas la "Centmilfutatan Sal-ponton" de la Ĉarhansallago, oni povas trovi, ke la salo jam estas tute pura. La aŭtovojo, trapasas la sallagon je distanco de pli ol 30 kilometroj. La lago longas je pli ol 100 kilometroj de la oriento ĝis la okcidento. La tuta surfaco de la lago estas kovrita de malmola sala krusto. Se en ĝi oni enfosas pli ol 1/3 metron, oni tuj trovas solvaĵon saturitan de kalisalo. Sur vojo farita sur glatigita salkrusto, kuras grandaj ŝarĝaŭtoj plenaj de materialoj kaj instalajoj. La domoj apud la vojo, en kiuj loĝas la vojriparaj laboristoj estas konstruitaj ankaŭ el salo. Antaŭ-nelonge, sur la lago estas konstruita nova fabriko por produkti kalisterkon. Ĝi certe estas unu el plej kuriozaj fabrikoj en la mondo. La materialo kiun ili uzas estas salo, la akvo per kiu ili lavas entenas salon kaj la post-restaĵo kiun ili forjetas estas ankaŭ salo. Krome, ĉio estas alprenata el sub iliaj piedoj, ĉar la grundo sur kiu la laboristoj paŝas, konsistas el kristalaj kubaj saleretoj.

Eĉ donacojn kiujn mi ricevis de la gastigantoj estas ankaŭ salo. Inter ili estas "vitra salo" kun grandeco de briko en koloro ruĝa, blua aŭ blanka kaj estas "perla salo" formita el multege da sal-globetoj kuniĝintaj. Tie neniu vendejo vendas salon. Kiam kuiristo ĝin bezonas, li simple skrapas ie ajn por ĝin ricevi. Por pekli rafanojn, li devas nur fosi la teron en sia kuirejo

kaj meti en la kavon akvon kaj la legomon. Post kelkaj tagoj la rafanoj jam estas manĝeblaj.

Baseno de trezoro

Abundas en Kinghaj ne nur salo, sed ankaŭ aliaj mineraloj.

Ni vizitis la tiam esploratan Hitie-monton. Jam pli ol cent homoj komencis permane kolekti tie la litargiron, kiu montras sin sur la montsurfaco en formo de flava pulvoro. La mineralo sub la montaro entenas ĉefe plumbo kaj zinko, sed kune ankaŭ pli ol dek aliaj materioj, inter kiuj estas kelkdek tunoj da oro. La ferpirito, kies kvanton oni kalkulas per milionoj da tunoj, estas nur malmultekosta krom-produktaĵo ĉi tie.

Ĉe la piedo de Kunlun-montaro, ni vizitis malgrandan fabrikon kiu produktas laŭ indiĝena

Mateno ĉe olekampo de Karamai

Foto de Li Ji-fang



metodo borakson, kiu estas favorato de la epoko, liverante brulajon por nukleonaj reakciiloj kaj raketoj. Ĝenerale ekspluatinda estas jam la lago-akvo kiu enhavas tri milonojn da borakso, sed la kvanto de borakso entenata en la mineral-restaĵo de tiu fabriko multe superas tiun proporcion.


Parolante pri la petrolo, Cajdam jam famiĝas tra la tuta lando kiel unu el la kvar petrol-regionoj apud Jumen, Centra Siĉuan kaj Karamai. Al la demando, kiu el ili posedas la plej riĉan provizon la laborantoj en Cajdam diris: "Ne rapidu por konkludi, ni boru pliajn jarojn kaj tiam vidu.

Homoj de la unua generacio

Dum la malmultaj tagoj en kiuj ni restis en Mangja, la tamburoj kaj tamtamoj ne silentis eĉ en nokto. La anoncantoj de bonaj informoj unu grupo post alia venis al Kinghaj-a Esplora Buroo de Petrolo. La kvina taĉmento de la transport-trupo de Joŭŝa-montoj entreprenis kampanjon por transporti akvon al la put-boristoj sur montoj en rapideco de pli ol 50 kilometroj pohore, Ĉiu aŭto kondukata de du alternantaj ŝoforoj kuras en unu tago kaj nokto 1,100 kilometrojn. La taĉmento nomita per Ĝaŭ Ji-man*, kiu konsistis el tridek kelkaj laborantinoj — teknikistinoj, telefonistinoj kaj kuiristinoj — sukcesis elprovi 12 novajn produktajojn en unu vespero. En la jaro 1956, sin trovis tie entute pli ol 20 bor-maŝinoj, sed ili boris dum la tuta jaro nur iom pli ol 30,000 metrojn. Sed en la lasta jaro, ĉiu aparta bor-maŝino boris 32,000 metrojn.

Por pli da oleo el Karamai

Foto de Vu Ĉun-ĝan



Ĉio ĉi bone montras la klopodemon de la Cajdam-anoj. Ilia devizo estas: "Estu homoj de la unua generacio de Cajdam!"

Sed kio plej tuŝas nin estas la spirito de la basen-ekspluatantoj karakterizataj per romanti-kismo kaj maltimo al malfaciloj kaj danĝeroj.

En Cajdam, homoj el kiu ajn provinco povas facile trovi samprovincanojn. Sed male Kinghaj-anojn oni malofte renkontas. La kaŭzo estas tre simpla: la Baseno estis regiono preskaŭ senhoma antaŭe, kaj kiam estas alvokite partopreni ĝian ekspluatadon, homoj venis ĉi tien el ĉiuj direktoj.

Se oni diras ke la vivo tie ne estas malfacila, tio estas malvera. Ni vizitis la puton n-ran 19 sur la Heroa Monto. La boristoj loĝis sur mont-pinto profunde en la montaro, kie oni eĉ ne povis trovi malgrandan grundon sufiĉe ebenan por instali sian tendon. Akvo, oleo, greno kaj legomoj, ĉio devis esti alportataj de sub la monto. Laŭ la tuta longo de la aŭtovojo, profundajo sekvas krutan deklivon kaj abrupta kurbigo sekvas montgorĝon. Oni fariĝas nervostreĉaj kurante en aŭto sur monton kaj malsupren sub monton. Ĉi tie oni trovas nenion verdan en la vastajo. Dum la tuta jaro oni loĝas disigite de la infanoj kaj edzo aŭ edzino. La vetero ŝanĝiĝas abrupte: ventas kaj pluvas ĉiam subite kaj hajlo ofte vipas krakante iliajn aluminiajn kaskojn. Kelkfoje ventegoj tiel furiozas ke eĉ la tegmentoj de la tendoj estas forblovitaj. Sed kiel optimismaj la homoj ĉi tie estas! Ili ne nur laboras fervore kaj persiste, kaj rapidigis sian putoboradon pomonatan de kelk-dek ĝis pli ol 700 metroj, sed eĉ konstruis por si korb-pilkan ludejon sur la mont-supro kaj plantis smeralde verdajn cepojn en la tendo. Se iu diras, ke Cajdam ne estas bona loko, ili tuj komencas disputadon.

Ni ne vizitis la trupojn de geologiaj esploristoj sed nur babilis kun kelkaj kiuj revenis de ili. Certe la vivo de tiuj trupoj estas ankoraŭ pli malfacila ol la putoboristoj. En grupo de dek ĝis dudek personoj ili loĝas en sovaĝejo, for de aliaj homoj, kaj en ĉiun duonan aŭ unu monaton, nur, la kamel-karavano alportas al ili provizajojn kaj legajojn. En la mateno ili eliras kunportante kelkajn pecojn da seka pano kaj en la vespero ili revenas vadante ĝis la genuoj en neĝ-akvo. Tiuj kiuj laboras sur stepo devas surhavi kontraŭ-moskitajn kapvestojn, sen kiuj la svarmantaj moskitoj rekte enflugus en iliajn buŝojn. Tamen, ili diris: "Kiu en la mondo havas la senkomparan vivon de la esplor-grupanoj? Kien neniu iris ekde la antikveco, tien ni iras unuaj. Ni aldonas sur la mapon la mankantajn loknomojn." Kiom da lokoj en Cajdam ili jam baptis! Nun tiuj jam fariĝis loĝpunktoj kaj probable disvolviĝos en prosperajn urbojn, kiam la fervojo etendiĝos tien.

Ili “enradikiĝas” en Kinghaj

La vivo en la Baseno estas malfacila sed neniu tion diras. Tia diraĵo estas ofendo al la Kinghajanoj. Ili argumentas: “Nun ni havas en la Baseno farunon, porkaĵojn kaj legomojn. Ĉu tio estas vivo malbona? Vere, ĉu estas “senskvamaj fiŝoj” aliloke kiel ĉi tie? Forlasu vi la aŭtomobilon ĉe rivereto kondukanta al Kinghaj-lago, prenu laŭplaĉe bastonon aŭ ŝtonon kaj vi povas per ĝi frapi kelkajn fiŝojn longajn je unu aŭ du futoj por forporti ilin kun vi. Ĉu troviĝas aliloke agarikoj tiel grandaj kiel ĉapelo? Ĉu oni povas kolekti amason kaj amason da cigno-ovoj ĉe bordo de lago aliloke? Kaj ĉu oni povas manĝi aliloke fritaĵojn preparitajn per ursograsso kaj spicitan viandon de sovaĝaj ĉevaloj? En la Baseno ne nur abundas petrolo, plumbo, salo kaj borakso sed estas ankaŭ agrabla, senzorga vivo. Sur la vojo de Joŭsa-montoj al Mangja, la vojariparistoj kreskigas antaŭ sia dometo kelkajn arbojn kun verdaj folioj kaj la preterpasantoj ne povas ne halti por rigardi ilin. Li Gong-hjuan,

maljuna teknikisto de la Esplora Buroo plantis diversajn florojn en sia tendo. Vidante la verdajn foliojn kaj belajn florojn, kiuj aperas oaze en la mezo de la ĉie flava ĉirkaŭaĵo, oni ekpensas ke tiuj varme amantoj de la vivo jam “enradikiĝis” en Kinghaj.

La areo de Cajdam-baseno ampleksas 220,000 k.m. Ni vizitis rondire nur ĝiajn ĉefajn lokojn, kaj vojaĝis jam pli ol 3,000 kilometrojn, kaj tio egalas al 1½ obloj de la distanco inter Hining kaj Pekino, kvankam la Baseno estas nur angulo de Kinghaj-provinco. Parolante pri la “serĉado” de naturriĉaĵoj, la lokoj vizititaj de la geologiaj esploristoj en Kinghaj, konsistigas nur kvaronon de la tuta teritorio de la provinco. Tie kuŝas ankoraŭ vasta fekunda tero nekulturita kaj multaj subteraj trezoroj atendas ekspluatadon.

* *Heroa patriota martirino de Nordorienta Ĉinio mortigita de japanaj imperiistoj.*

La lianokabla ponto en Luoju

LUOJU estas riĉa lando en la sudorienta parto de Tibetregiono. Ĝi situas ĉe malsupra Jaruzangpo-rivero, proksime al Hindio. La klimato tie estas varma kaj pluvoriĉa, kaj la tero fekunda. Sen prujno kaj neĝo, la plantoj ĉiam verdas dum la kvar sezonoj, kaj oni rikoltas trifoje ĉiujare. Pro ĝia abunda agrikultura produkto, ĝi estas nomata River-sudo* de Tibeta altebenajo.

Tiuj kiuj iam estis en Luoju ne povas ne miri kaj admiri la kuriozan riveran transiron. Ĉar ĉe malsupra Jaruzangpo-rivero la bordoj estas krutaj, la akvonivela diferenco granda kaj la fluo torenta kaj rapida, tial en Luoju troviĝas nek ligna ponto nek boato, kaj la trafiko dependas sole de lianokablaj pontoj kaj glitiloj.

Liano-kabla ponto ofte longas ĉirkaŭ 130 metrojn kaj pendas ĉirkaŭ 40 metrojn super la akvo. Ĝi estas farita tute el liano-vito sen uzado de iu ajn fera framo aŭ najloj. La korpo de la ponto konsistas el kvardek kelkaj longaj kabloj streĉitaj kaj fiksitaj al fostoĵoj aŭ arbegoj sur ambaŭ bordoj de la rivero. Ĉirkaŭ dudek lianaj ringegoj fortikaj kvazaŭ el ŝtalo estas egaldistance ligitaj al la longaj kabloj por frame teni ilin apartaj sen implikiĝo kaj tiuj ĉi estas plie maŝitaj per malpli

dikaj kabloj alplektitaj. Supre, la ponto estas malferma al la ĉielo, kaj malsupre densa liana plektaĵo servas kiel planko. De malproksime, ĝi aspektas kvazaŭ granda drako fluganta super la rivero. Estas apenaŭ imageble, kiel oni sukcesis krei nur per du manoj tian mirindan trafikilon alte pendantan en la aero super la torenta fluo.

Irante sur la ponto la unuan fojon, oni ĉiam iom timemas, precipe ĉe la ambaŭ finoj de la ponto kiuj terure balancas kvazaŭ sur balancilo. Sed fakte estas nenia danĝero, oni nur tenu la flankajn kablojn kaj paŝu balance laŭ ĝia ritmo, kaj post kelkaj fojoj oni alkutimiĝas. La Luoju-anoj ofte kun ŝarĝo de pli ol 50 kilogramoj iradas rapide sur ĝi. Tamen ĝi estas malfacile transirebla por animaloj, nek estas transirebla por pluraj personoj samtempe.

Laŭ kutimo kaj neceso, la ponto estas riparata dufoje en ĉiu jaro post la leviĝo kaj malleviĝo de la riverfluo. La riparo ĉiufoje bezonas ĉirkaŭ 1½ tunojn da lianoj kaj ducent labortagojn. En Luoju ekzistas kelkdek tiaj pontoj.

Kiam vi alvenas al la mezo de la ponto, vi trovas ke supre senfinas la lazura ĉielo, kaj malsupre tondras la torentanta akvo. Blanka neĝo kronas la malproksimajn montojn, kaj la verda arbaro dense kovras la proksimajn bordojn. La pejzaĝo estas tiel bela ke estas vere malfacile priskribebila.

Gi Ven-ĝeng

* *River-sudo — regiono sude de malsupra Jangzi-rivero, unu el la plej fekundaj lokoj de Ĉinio.*

Gaŭ k Giaŭ :

Grandaj produktaĵoj per malgrandaj maŝinoj


PAROLANTE pri fabriko de granddimensiaj meĥanikaj ekipaĵoj, oni nature ekpensas pri gigantaj konstruaĵoj kun framoj el kolosaj ŝtalaj traboj kaj fostoĵoj, pezaj maŝinoj altaj kiel kelketaĝaj domoj, grandegaj centtunaj trabgruoj. Sed, en Harbino, troviĝas fabriko por tiaj produktaĵoj sed sen tiaj konstruaĵoj kaj tiaj maŝinegoj aŭ levilegoj. Tio estas la fame konata Harbina Gilian-Maŝin-fabriko.

Ĉi tiu fabriko disvolviĝis origine el kombiniĝo de 33 malgrandaj forĝejoj, kun kelkaj modestaj dometoj kiel fabrikejo. En la komenco, la tuta ekipaĵo konsistis nur el kelkdek, por tiel nomataj maŝinoj rimene movataj, ĉiuj kun aĝo de 20 ĝis 60 jaroj. Enirinte la korton de la fabriko, oni tuj vidas sub libera ĉielo apud la muro barakon el eluzitaj matoj, en kiu oni prilaboras dentradon kun diametro de pli ol dek futoj per granda vertikala tornilo, konstruita el malnova bazo de kontraŭaeroplana pafilego, postlasita de la japanaj invadintoj dum la tempo de ilia kapitulacio, kaj kelkaj malnovaj ŝtalreloj. Ĉirkaŭe estas kelkaj tendoj, en kiuj pluraj tiel nomataj "konstru-bloko-tipaj" maŝinoj laboras super diversaj partoj de pezaj maŝinoj.

Ĉi tiu fabriko, kiu ne havas fiksitajn produkt-taskon, ofte plenumas mendojn, ne akceptitajn de aliaj fabrikoj, el kiuj multaj estas malfacile fareblaj granddimensiaj maŝinoj. Dank' al la maljunaj kvalifikitaj laboristoj kun iliaj multjara sperto super maŝinoj kaj ĉionfaraj manoj kaj armitaj per teorio de neinterrompita revolucio, la fabriko sukcesis elfari diversajn simplajn sed celtaŭgajn maŝinojn el malnovaj maŝin-partoj kaj ŝtalreloj, kaj per tio,

Grandaj maŝinpecoj estas fabrikataj eksterdome

Foto de Hu Vej



plenumis taskojn, neplenumebajn per eĉ novtipaj maŝinoj en grandaj fabrikoj. Post senĉesa plibonigado kaj cerbumado, ili venis al la konkludo, ke ĉiu komplika maŝino konsistas el nenio alia ol "tri ĉefaj partoj", t.e. la tranĉilo (tranĉa parto), la turnilo (movotransiga parto) kaj la korpo (subportanta parto). Per tiuj tri partoj estas eble kunmeti diversspecajn dispartigeblajn maŝinojn, kiel infanoj konstruas domon per konstru-blokoj. Por fabriki longan maŝinon, ili pli longigas la "korpon" per malnovaj ŝtalreloj; por fabriki altan maŝinparton, ili starigas la "korpon" vertikale, kaj same plialtigas ĝin per aldono de ŝtalreloj. Por prilabori grandan dentradon 12-fut-diametran, ili ne bezonas kiel oldinare kelkdektunan grandan ŝraŭb-tornilon, sed utiligante la leĝon de "la tri ĉefaj partoj" ili simple vertikaligas la subportan parton de malnova okfuta horizontala tornilo, por ke ĝi servu kiel portilo de la tranĉilo de grandtipa vertikala tornilo. Ĉar tre malmultaj tiaj grandaj ŝraŭb-torniloj nun

Ĝaj Ki-jin :


LA VERDA

LA granda konstrua laboro de Verda Granda Muro el arboj en la okcidenta parto de Gansu-provinco, estas finita en la fino de la lasta jaro.

Tiu ĉi Verda Granda Muro serpentumas orienten de Dunhuang-gubernio, en la ekstrem-okcidenta parto de Gansuprovinco, trapasante dek ses guberniojn ĝis Gulang-gubernio, kaj kunigas kun la protekta forstozono de Dinghi-distrikto. La tuta longeco de ĝia ĉefa zono estas pli ol 1600 kilometroj, kun meznombra larĝo de 1.5 kilometroj, kun pli ol cent branĉaj zonoj kaj subzonoj. La tuta longeco superas 5,000 kilometrojn, kaj la areo okupata de la forstozono ampleksas 320,000 hektarojn. Laŭ takso, post kelkaj jaroj ĝi kroniĝos per verda foliaro, kaj pliigos la pluvokvanton je 100 mm, kaj produktos 120,000 kubmetrojn da ligno. Tio ne nur mildigos la sekan klimaton de la River-okcidenta Koridoro, sed ankaŭ starigos bazlokon por transformi la dezerton Gobio.

troviĝas en la tuta lando. Kaj por konstrui cementbazon kaj munti tian maŝinon, oni bezonus almenaŭ 4 monatojn. Male la muntado de ĉi tia dispartigebla “konstrublok-tipa” maŝino, bezonas nur duontagon, kaj krome ĝi funkcias tre efike.

La kreo de tia “konstru-bloke” formebla maŝino fundamente disrompis la misteron de produktado de pezaj maŝinoj, kaj malfermas novan vojon por tio en nia lando. Pro tio ke la strukturo estas simpla kaj facile komprenebla, eĉ en ordinaraj urbetoj estas eble el kelke da malnovaj maŝinoj formi tiajn “konstru-blok-tipajn” maŝinojn. Eĉ se tute ne ekzistas iaj malnovaj maŝinoj por transformi, ili estas ankaŭ nove fabrikeblaj per malmulte da fero kaj ŝtalo, ne multkoste. Minejoj en foraj anguloj povas jam laŭ tiu maniero provizi sin per pezaj ekipaĵoj kaj ne bezonas plu ilin mendí en Ŝanhajo aŭ aliaj grandaj urboj.



Harbina Gilian-maŝinfabrika faras ankaŭ ekipaĵojn de 50-tuna forno de cement-fabrika


Foto de Liu Ging-ĉaŭ

GRANDA MURO

La areo de la dezerto Gobio en Riverokcidenta Koridoro ampleksas proksime 13,333,000 hektarojn t. e. okono de la tuta dezerta areo de nia lando. Vento kaj sablo estas la fonto de ĉi-tieaj diversaj naturaj katastrofoj. En la malnova socio, oni rigardis la venton kaj sablon kiel ian forton dian, nerezisteblan. La popolo de Minkin-gubernio, kiu estas je tri flankoj sieĝata de sablo, la unua forĵetis la superstiĉon al “Sablo-dio” antaŭ ok jaroj, kaj starigis 94,000 hektarojn da forstozono kontraŭsabla. Tio liberigis la penson de homoj kaj pavimis la vojon al grandskala verdigo de dezerto. Kaj post tio, la movado de “verdigi dezerton” disvolviĝas ankaŭ en la ceteraj gubernioj.

En multaj lokoj nun la forstaj punktoj jam kuniĝis en zonojn, kaj la zonoj en reton. Kie antaŭe oni interaŭdante ne povis intervidi sin kaj en la domo estis necese bruligi lampon dum la tago, tie nun jam ombras verdaj arboj, kaj bonodoras floroj, ruliĝas tritikaj ondoj kaj prosperas kotonplantoj. Minkin-gubernio ekzemple jam ŝanĝis 28,000 hektarojn da dezerto en kultureblan teron. Lastjare ĝi produktis meznombro 4950 kg. da greno po hektaro, t.e. pli ol sesoble ol antaŭ la liberigo, kaj havas po 1250 kg. por ĉiu loĝanto.

En la luktado por jungi la dezerton, popolamasoj




kreeme uzis sian saĝon kaj forton. Laŭ la diversaj tipoj de sablamasoj, — mova, fiksa, izola sabla monteto, aŭ kontraŭventa sabla eĝo ili adoptis diferencajn metodojn, aŭ kreskigi forstojn kaj herbojn, aŭ surkovri per tero, aŭ alfari ventsirmajn murojn kaj barojn, aŭ kreskigi arbarojn per maŝinoj aŭ semadi per aeroplano k.t.p. por kontraŭbari venton kaj fiksi la sablon. Kelkfoje, por subterigi unu sablomonteton, ili devis ebenigi ĝin kaj en malproksima loko profunde fosi por tero, kiun

ili malfacile portis sur la altan sablomonteton. Kiam la kovrita tero kune kun la arbedo estis forblovitaj de la vento, oni devis ripeti la saman laboron. Lastjare dekmiloj da homoj diligente surgrimpis Kilian-montaron, kaj ofte tranoktis en Gobio por kolekti arbosemojn por la Verda Granda Muro, kiuj entute sumiĝis 6000 tunoj, kaj por ke la arbedo ne estu mortigitaj de la varmega suno kaj altiĝu la proporcio de viviĝo de la plantitaj arboj, la heroa popolo per siaj propraj manoj en-

LAŭ ĉina malnova legendo, vivis, antaŭ du mil jaroj, saĝulo Gongje Ĉang, kiu scipovis birdan lingvon. Li estis ŝatata disĉiplo kaj poste bofilo de Konfucio. En la libro "Lun Ju" (Vortoj de Konfucio) troviĝas paragrafo pri tiu ĉi saĝulo.

Li De-fa en praktika montrado pri kaptado de malutilaj birdoj



Nun en granda arbaro en Ŝuangbaj-gubernio de Junnan-provinco troviĝas vera scianto de birdlingvo kiel Gongje Ĉang en la legendo. Li estas Ji-naciano nomata Li De-fa kaj scipovas lingvon de multspecaj birdoj. Kiam li imitas birdĉirpon, tuj alflugas al li kaj falas en liajn kaptilojn multaj birdoj, kiujn li facile kaptas. Li bone scias la vivkutimojn de kelkaj malutilaj birdoj kiel hokbekulo kaj estas specialisto en kaptado de malutilaj birdoj.

Je Zi-gian:

Scianto de

— Pri Li De-fa, specialisto en

Praktika demonstrado de birdokapto

Je la 23-a de septembro de 1958 Ŝuangbaj-gubernia Komandejo por Ekstermi la 4 Malutilajn Bestojn (t.e. muŝo, moskito, muso kaj pasero) invitis lin montri praktikadon de kaptado de malutilaj birdoj.

Frumatene de la tago mi renkontis lin en densa pin-arbaro. Li estas viro mezaĝa kun du grandaj kaj brilaj okuloj en la bruna vizaĝo. Ĉeestis ankaŭ k-doĵ de la Vastampleksa Esplortrupo de Ĉina Scienca Akademio pri Tropikaj vivajoj, Junnan-a Komitato de la Patriotisma Higiena Kampanjo kaj la Ŝuangbaj-gubernia Komandejo por Ekstermi la 4 Malutilajn Bestojn. Sekvante lin ni surgrimpis sur grandan monton. Starante tie sur montpinto mi ĉirkaŭrigardis kaj vidis ondantajn montojn kovratajn de densaj pin-arbaroj. La suno iom post iom leviĝis de post orienta monto. Vigliĝis la arbaroj. Birdetoj jen alflugis jen deflugis ĉirpante. Li De-fa ekpuŝis la dikan fingron de la maldekstra mano en sian buŝon kaj eligis klarajn ĉirpojn. Tion aŭdinte, iu hokbekulino sur kontraŭa monto tuj ekĉirpis responde.

Li De-fa diris al ni: "Ĉi tie vivas paro da hokbekuloj. Tian birdon ni nomas hokbekulo, ĉar ĝia beko estas hokforma kaj duoncolon longa. Ĝia scienca nomo estas *Pomatorhinus Erythrogeus*. Ĝi sin nutras per maizo k.s. kaj estas malamiko de kamparanoj."

Embusko

Parolante li metis 4 kunportitajn maŝkaptilojn (sur ĉiu kaptilo troviĝas dekkelkaj streĉeblaj maŝoj

fosis la dezerton kaj faris kanalojn tegitajn de ŝtonoj por enkonduki akvon.

Ili jam konstruis 2257 grandajn kaj malgrandajn kanalojn, kiuj kune longas 2755 kilometrojn, kaj fosis 5661 putojn. Nuntempe laŭ longe de la forstozono la popolaj komunumoj establis pli ol 420 specialajn forstokulturejojn, kiuj garantios, ke la konstruado kaj flegado de la Verda Granda Muro estos plenumataj multe, rapide, bone kaj ekonomie.

birdlingvo

kaptado de malutilaj birdoj—

faritaj el ĉevalaj vostonoj sur branĉojn de arbustoj kaj poste sin kaŝis sub ili kovrata per folioj sur la tuta korpo.

Ni kuris sur proksiman monteton kaj tie lin observis per binoklo.

Ĉirpa dueto

Nun el la arbustaro li aŭdigis imititan ĉirpadon de hokbekulino. Aŭdinte tion iu vira hokbekulo tuj alflugis kaj eksidis sur branĉo kun kaptilo, tuj alduetis intime kun Li De-fa. Ĝi ĉirkaŭrigardis por trovi la invitantan birdinon, sed subite li trovis, ke li falis en kaptilon, kaj klopodis sin liberigi per energia baraktado. Sed ju pli ĝi baraktis, des pli streĉiĝis la maŝo. Ĝi konfuziĝis kaj helpon petis ĉirpegante. La vera hokbekulino alflugis por savi lin, sed ankaŭ ŝi falis en kaptilon. Li De-fa stariĝis kaj deprenis la ambaŭ.

Scii birdan lingvon, koni birdan vivkutimon

Li De-fa scipovas 11 malsamajn birdĉirpojn de *Pomatorhinus erythrogenys*, *garriulax sannio*, fazano k.a. Se li imitas ĉirpon de vira birdo, al li alflugas la ina; se li imitas tiun de ina, alflugas la vira. Kaj se li imitas ĉirpon de birdido, al li alflugas ambaŭ ĝiaj gepatroj.

Ekde la 18-jara aĝo li ekimitadis ĉirpojn de birdoj kaj li jam scipovis la lingvon de birdoj kiam li estis 20-jara. Dum dekelkaj jaroj li kaptis

pli ol 40 mil malutilajn birdojn. Dum sia longtempa praktikado li akumulis riĉajn sciojn pri la vivmaniero kaj kutimo de malutilaj birdoj. Laŭ malsamaj kreskaĵoj kaj malsamaj sezonoj li povas precize juĝi, sur kiu monto troviĝas malutilaj birdoj, sur kiu parto de kia kreskaĵo nestiĝas kia birdo. Li scias, traserĉi nestojn de malutilaj birdoj kaj elpreni iliajn ovojn. Se oni donas al li ajnan ovon de hokbekulo, li povas tuj antaŭsciigi al vi, la sekson de la birdido, kiu eliros el la ovo. Kaj li neniam juĝis erare.

Scienca Raporto

Lasttempe Li De-fa faris sciencon raporton al pli ol cent specialistoj kaj spertuloj en kunveno por ekstermo de la 4 malutilaj bestoj en Junnan-provinco. Dum la periodo de la kunveno li kaptis okdek kelkajn malutilajn birdojn. Multaj specialistoj, kiuj aŭskultis lian raporton kaj vidis lian praktikan demonstradon, alte lin taksis. Ili opinias, ke lia scio pri la vivmaniero kaj kutimo de malutilaj birdoj estas rimarkindaj kaj liaj metodoj por ilin kapti estas originalaj. Nun du biologiaj laborantoj de la Ĉina Scienca Akademio lernas ĉe li.

Lastatempe li eltrovis rimedon por ellerni birdoĉirpojn per du speciale maldikaj langetoj el bambuo aŭ ligno enmetitaj en la buŝon. Oni povas facile sukcesi en la lernado nur en dek kelkaj tagoj.



Nove interkonataj kamaradinoj

Ilustris A Laŭ

“Vi estas Vu Ŝu-lan, ĉu ne? . . . Hieraŭ, kiam vi ekparolis en la kunveno, mi tuj konjektis, ke vi nepre devas esti tiu fame konata Vu Ŝu-lan. . . . Jam de longe mi deziras viziti vin, sed mi ne sukcesis trovi tempon . . . O, mia ĉielo! Kiel bela vi estas! . . .”

Vu Ŝu-lan, dudek-sep-ok-jara kamparanino kun malheleta haŭto kaj vizaĝo de melon-sema

formo, staris sur kamprando apudvoja. Ŝi portis bone sidantan jaketon el blua katuno kaj nigran pantalonon kaj kun trankvila kaj scivolema rideto rigardis al la alparolantino. Malantaŭ ŝi etendiĝis verda maro de kotonkamparo kaj la serena ĉielo.

Tiu, kiu ŝin alparolis, estis samaĝa, sed pli maljunaspekta virino mezkreska, kun rondaj ŝultroj, ruĝaj vangoj kaj elŝovita supra lipo. La esprimo

Defendu la hom-raĵtojn

— Alvoko al la geesperantistoj de la tuta mondo —

Karaj gesamideanoj,

Kun neesprimebla doloro kaj granda angoro, ni vietnamaj geesperantistoj en Vietnamia Demokratia Respubliko, metas je la sciigo de Vi, pacamaj kaj progresemaj geesperantistoj en ĉiuj landoj, la kruelegan masbuĉadon per venenado al pli ol 1,000 politikaj malliberuloj patriotoj en la koncentrigejo Phu-Loi (Fu-Loj) en Sudvietnamio, fare de la tiea registaro Ngô-dinh-Diêm (Zjem) laŭ la ordono de la Usonaj imperialistoj.

Dume restas tie pli ol kvin mil gepatriotoj ĵus supervivintaj la venenadon, kiuj bezonas urĝan kaj fortan helpon el la tutmondo progresema por elliberiĝi el la nunaj nigraj tendencoj de la kliko Uson-Zjem.

La 1-an de decembro 1958 estis granda funebro-tagŝo por la tuta vietnama popolo tiel suda kiel norda, samtempe ĝi markis frenezan antaŭenpaŝon de la kliko Usono-Zjem al faŝisma reĝimo en Sudvietnamio.

Perfakte, la kliko Usono-Zjem sin deklaris kontraŭulo de nia teritoria unuigo per pacrimedo. Ili estas streĉantaj energion transformi Sudvietnamion en militbazon, kaj tiucele ili rifuzis nenian kruelaĵon kaj fiaĵon por ekstermi de nia popolo la pacamajn kaj patrujamajn gefilojn. Ili estas transformantaj la koncentrigejon Phu-Loj kaj aliajn malliberejojn en Sudvietnamio en Augvitz, Daŝo, Buhenvalt!

Karaj geamikoj kaj gesamideanoj,

Ni apelas vian grandaniman subtenon kaj helpon por nia nuna amaspopola batalo celante reteni la sangavidajn manojn de la kliko Uson-Zjem en Sudvietnamio. Ni proponas ke vi sendu amase malkaŝajn protesto-leterojn al la sudvietnama registaro Ngô-dinh-Diêm (Zjem), akuzo-leterojn kontraŭ la malhumaneca kaj malleĝa masbuĉado de malliberuloj fare de Zjem al la Prezidanto de la Internacia Militĉesiga Kontrolo-Komisiono en Saigon (Sudvietnamio) kaj al la Ĝenerala Sekretario de la Organizo de Unuigitaj Nacioj. Ni proponas ke vi proklamu vian justeceman kaj humanisman voĉon kontraŭ la barbara ago de la kliko Usono-Zjem samtempe publikigu nian leteralvokon en vialanda gazetaro. Tionfare ni plifirmigos la noblan amikecon inter vi kaj la vietnama esperantistaro patrujama ankaŭ vi altigos la Zamenhofan humanisman spiriton utiligante Esperanton por la rajtoj de la homo, la libereco de ĉiuj popoloj.

VIETNAMA PACDEFENDA
ESPERANTISTA ASOCIO

* Bonvole sendu kopion de via letero aŭ artikolo al: VPEA, 15, Tôhiên-Thành Hanoi (via USSR).

de ŝiaj okuloj montris, ke ŝi estas kuraĝa, aŭdaca kaj sincera virino. Vu rigardadis ŝin per demandantaj okuloj: "Kiu ŝi estas?"

"Mi estas Ĝang La-jue. . . ." diris la brava virino kun fiero, "la sturma batalantino Ĝang La-jue. Eble vi iam aŭdis pri mi, ĉu ne?"

"Jes, jes!" Infektite de tiu nomo Ĝang La-jue, kiun ŝi jam preparolis sennombrajn fojojn, de la ĉeesto de tiu ĉi virino mem ĝuste antaŭ ŝi kaj de ŝia malkaŝema sintenado al aliuloj, la ĉiam kvieta Vu Ŝu-lan ankaŭ vigliĝis ekstervole. Rapide kaptinte la dikan manon de Ĝang, ŝi daŭrigis: "La hiang-estro* diris al mi, ke vi ankaŭ venos ĉeesti la kunvenon. . . . Antaŭhierau, kiam mi vizitis la hiang-oficejon, oni diris al mi, ke vi jam estas sur vojo. . . ."

"Mi havas temperamenton de krakfajraĵo, kiu tuj eksplodas ĉe ekbruligo, kaj mi ne ŝatas malrapidemon," laŭte diris Ĝang. "Ĉe la unua fojo fremduloj, sed la duan fojon konatuloj. Hodiaŭ ni interrenkontiĝis kaj de nun fariĝas propraj fratinoj. . . . Mi jam informiĝis, ke ni estas samaĝaj, ambaŭ naskiĝis en jaro de ŝafo*. Ĉu ne?"

"Jes," respondis Vu ridetante.

"O! Jen, kia hazardo!"

Pririgardante Vu-n, Ĝang diris en humoro nekonvinkiĝema: "O! En la lastaj tagoj mi ĉiam imagis ke tiu Vu Ŝu-lan ja certe havas tri kapojn kaj ses brakojn, kaj nepre estas pli altkreska kaj pli fortika ol mi. Mi ne povis kredi al la aserto, ke vi estas pli svelta ol mi. . . . Kiu ja atendis, ke vi, tia sveltulino, efektive min kontraŭstaras!"

Ŝu-lan diris kun rideto: "Ankaŭ vi estas tre svelta, franjo Ĝang!"

"Mi? Svelta?" demandis Ĝang gaje palpebrumante, kaj daŭrigis serioze: "Mi aŭdis de mia patrino, ke mi estis efektive tre svelta ĵus naskite, tiel, ke ŝi ne povis aŭdi miajn plorkriojn. . . . poste mi servis kiel ĉionfara ĉambristino

* *Hiang* — administra unuo super vilaĝo.

* *Ĉinoj* tradicie kalkulas la jarojn per dekdu bestoj laŭvice en cikloj.

en la hejmo de Milionulo Ĝaŭ. . . . Kaj plie, post la geedziĝo mi ĉiam tiradis la bovon aŭ kuradis post la ĉaro por mia edzaĉo. Tiel iom post iom forlasis min la svelteco." Parolante ŝi suprenpuŝis la manikon ĝis la ŝultro, montris la dikan brunigran brakon, ĝis la vizaĝo de Vu kaj ŝercis, sin mokante: "Jen, rigardu! Kiel svelta ĝi estas!"

Vu Ŝu-lan senprokraste subpremis ŝian brakon kaj diris: "Tuj retiru la manikon! Oni ja rigardas nin tie."

La-jue rapide reordigis sian manikon kaj samtempe jetis rigardeton al la kontraŭa kamp-rando. Returninte la kapon ŝi diris: "Mi tute ne timas ilin! Ekde la agrara reformo mi jam kutimiĝis aŭdaci!" Fiere ŝi daŭrigis: "Ŝajnas al mi, ke vi ankoraŭ malmulte travivis kaj venas nun la unuan fojon al la publiko, ĉu ne?"

Kapjesis Vu Ŝu-lan.

"Ĉu vi jam aniĝis al la Partio?" zorgeme demandis Ĝang.

"Ankoraŭ ne," respondis Ŝu-lan ruĝiĝante.



“Ah! Kiel povas esti, ke vi ankoraŭ ne fariĝis partiano!” Ĝang La-jue rondigis miregantajn okulojn. “Tuj prezentu vian aliĝan petskribon, ho, tuj! Ej, vi. . . .”

“Mi jam tion faris.”

“Do estas bone. . . . Eble via edzo malhelpas vin. . . . Antaŭe la viroj plendis, ke la virinoj malhelpas ilin sed nun kontraŭe, kelkaj viroj malhelpas la virinojn. Kia homo estas via edzo?”

“Partiano,” respondis Vu.

“Des pli bone!” diris Ĝang gravmiene: “Sed ankaŭ sin trovas partianoj, kiuj malhelpas la edzinon. Ĝuste tia estas mia aĉulo . . . Tamen finfine li estas de mi transdukita. . . . Oni devas konstante edukadi sian edzon, por ke li ne fariĝu obstaklo!”

“La mia. . . . tamen edukas min de tempo al tempo,” konfesis Ŝu-lan submetiĝeme kaj sincere.

“Kio? Vi iam posttiris lian kruron?” demandis La-jue ridante.

“Tio ne!”

Post momento da fiksrigardado al Ŝu-lan, Ĝang La-jue ekdiris kun signifoplena rido: “Mi jam vidas! Vi certe estas la tiel nomata bona virino.”

Kunpremante siajn belajn lipetojn, Ŝu-lan ridis delikate kaj varme rigardante al la leoneca La-jue, silente konsentis, kion Ĝang opiniis.

Vu Ŝu-lan estis efektive “bona virino”. Kiu el la parencoj, amikoj aŭ samvilaĝanoj ne laŭdis ŝin kiel bonan edzinon! Sed ŝia edzo nur ekridis je tiuj laŭdoj, nenion dirante. Li estis komunisto kaj kadro de l' baz-tavolo, sekve li dediĉis sian tutan tempon hejmomastruman al publikaj laboroj. Sed Vu neniam grumblis pro tio kaj kun tiu ĉiam tenata afabla rideto prenis sur sin la tutajn banalajojn de dommastrumado.

Iafoje ŝia edzo diris al ŝi: “Okazos amaskunveno ĉivespere. Iru partopreni ankaŭ vi!” Ŝi nur ridetis al li, senvorte, kaj restis kudranta ĉe la lampo.

Post nelonge, ŝia edzo refoje diris al ŝi: “Oni fondos kurson por virinoj en la vilaĝo. Ankaŭ vi aliĝu al ĝi!” Ŝi ridetis kiel antaŭe, nenion dirante, kaj daŭrigis absorbite la kutimajn hejmlaborojn laŭ sia fiksitaj tagordo validanta por la 360 tagoj.

Post multfojaj admonoj senrezultaj, iam kaj tiam la edzo parolis en tono riproĉa kaj malkontenta. Tiukaze ŝi fiksrigardis lin per gapantaj

konfuzitaj okuloj miroplenaj, kaj demandis en milda kaj mallaŭta voĉo: “Ĉu tiel ne estas jam bone?”

Ŝin rigardante, la edzo nur skuis la kapon, kuntiris la brovojn kaj ĝemis. . . .

Depost la organiziĝo de agrikultura kooperativo en la vilaĝo, Vu Ŝu-lan eklaboris sur la kampo kune kun aliaj virinoj. Ĉiam ŝi laboris honeste, kaj neniu alia virino estis komparebla kun ŝi en laboro; ĉiun ŝi traktis sincere kaj ĉiu ajn alia virino amis ŝin. Pasis duonjaro, kaj ŝi estis elektita vicestro de la produkta brigado. La novan oficon ŝi nek ŝatis speciale, nek rifuzis, kaj prenis sur sin la novan laboron same tiel kiel “bona edzino”. En ĉiu ajn kunveno, de l' kooperativo aŭ de l' laborbrigado, ŝi neniam forestis aŭ malfruis, nek parolis ion, sed ĉiam sidis en angulo kun kudraĵoj en la manoj, kviete ridetis kaj aŭskultis la diskutadon de aliaj ĉeestantoj. Post la kunveno ŝi hejmen revenis, neniam pli frue, nek postrestante longe.

Lastan vintron komenciĝis la granda impetado. La vivo ekardiĝis kaj ekstreĉiĝis kvazaŭ en ventkirlo. Nerimarkite involviĝis en tio ankaŭ Vu Ŝu-lan. Malmultiĝis la tempo de ŝia hejmrestado. Plimultiĝis ŝiaj paroloj en la kunvenoj. Ŝi komencis kontraŭargumenti kun aliuloj en multthomaj kunvenoj. Ŝia edzo ĉiam rigardis ŝin per demandantaj okuloj: Ŝi ŝanĝiĝis!

Tiam la nomo de la sturma batalantino Ĝang La-jue famiĝis tra la tuta ĥiang-o. La virina produkta brigado, kiun ŝi gvidis, firme tenis la ruĝan flagon en ĉiuj konkuroj. Kvankam multaj defiaj leteroj alflugis al Ĝang, sed la senkompare brava Ĝang nenion fojon lasis sin superita de la konkurantoj.

Antaŭ duonmonato, Ĝang La-jue aŭdis iom nebule, ke iu Vu Ŝu-lan, estrino de la virina produkta brigado de l' Dua Suda Kooperativo, senbrue sturmas en konkuro kun ŝi; kaj ke sur ĉiu agrikultura instrumento de l' brigadaninoj sub Vu Ŝu-lan estas algluita slipo kun la slogano “Superu Ĝang La-jue”. Efektive, post malpli ol dek tagoj, en la juĝkunveno, la brigadaninoj de Vu Ŝu-lan triumfe forportis la ruĝan flagon. Tiun tagon Ĝang ne partoprenis la kunvenon pro iu afero. Posttagmeze, kiam ŝi vidis la aninojn de sia brigado reveni kun la flava flago, ŝi kriis kolera. “Kial vi, sentaŭgulinaj, tian reportis? Kie estas nia ruĝa flago?” “Ĝi estas forportita de Vu Ŝu-lan,” murmuris la brigadaninoj. “Kia Vu Ŝu-lan? Ĉu ŝi havas tri kapojn kaj ses brakojn?” “Multe pli svelta kaj pli bela ol vi!” “Nu, mi nepre vidos tiun Vu Ŝu-lan por certiĝi, kiom pli bela ŝi estas ol mi”

Guste tiam, la gubernia partikomitato kunvokis ĉe-la-aktual-lokan kunvenon de l' prizorgado de kotonkampoj en la Orienta Hiango. La partikomitato de ilia hiang-o sendis ilin ambaŭ kiel reprezentantojn al la kunveno, kie ili interkonatiĝis. La-jue ekamis Vu Ŝu-lan jam ĉe la unua vido.

"Ne ridu tro frue, mia bonulino!" gaje diris Ĝang, rigardante la malfrivoleman ridetantan Vu. "Kiam Ĝang La-jue rivalas al vi, vi ne havos ŝancon eĉ por paŭzeti. Eh, ne kredas? Do provu!"

Tion dirante, ŝi levis sian pugnon kaj peze frapetis sur la ŝultron de Vu Ŝu-lan.

Ridante Ŝu-lan tion forevitis.

En la posttagmezo de l' sekvinta tago, la du novaj interkonatinoj surpaŝis la grandan vojon ŝultron ĉe ŝultro por reiri hejmen. Dum la rapidema piedirado ili arde diskutis, kiel oni superu la Orientan Hiang-on en la konkurado kaj samtempe pririgardis jen ĉielen, jen ĉirkaŭen.


Li Cun-song:

ORA FENIKSO

1. En nia epoko vivas junulo plej forta, diligenta kaj kuraĝa. Sub luno kaj steloj, kontraŭ pluvo kaj vento li iris trans naŭdek naŭ montojn, tra naŭdek naŭ arbaroj kaj trans naŭdek naŭ riverojn por serĉi la oran fenikson, kiu povas plibonigi la vivon.

2. Li iris, iradis, kaj iutage aperis antaŭ li inunda rivero, kiu baris al li la vojon. Tion faris ja malica drako. La junulo koleriĝis, ekkriegis, levis montegon kaj ĝin jetis al la malica drako. La malica drako haste blekis: "Mi kapitulacas!"

3. Trans la inunda rivero aperis tero diskrevigita de monstro Sekeco. La junulo indigna ordonis al la drako kaj ĝi tuj obeeme elvomis diluvon kaj dronigis la monstron Sekeco.



Sur la vasta kamparo vento levis polvajn nubojn. Sur la ĉielo plene amasiĝis grizaj pluvaj nuboj, kiuj flugis tiel malalte kvazaŭ oni povus ilin kapti eklevante la manon.

“Ni pli rapidigu la paŝojn, franjo Ĝang!” maltrankvile diris Vu Ŝu-lan, rigardante la ĉielon. “Jen vidu, kiel la ĉielo malkvietas kaj aspektas ke ĝi nenion bonan faros.”

“O! Ne zorgu!” laŭte kriis Ĝang tute senĝene. “Se pluvos, ĝi pluvu forte!”

Ekridis Vu: “O, franjo Ĝang! Baldaŭ vi alvenos hejmon, sed restas antaŭ mi ankoraŭ pli ol dek lioj!”

“Denove via obstineco!” diris Ĝang mal-

kontente. “Tiom da fojoj mi jam petis, ke vi vizitu mian hejmon. Ne decus al amiko, ke vi tion rifuzas.” La lastan frazon ŝi intence parolis en lingvaĵo de viroj.

Ĉiel ajn, ni ja devas rapidi, por ne esti priverŝitaj.”


“Jen jam parolo deca por intima amiko,” diris Ĝang ĝoje plirapidigante siajn paŝojn.

Pli kaj pli malheliĝis ankoraŭ la ĉielo. Post ne longe la vento kvietiĝis kaj la nuboj ankaŭ koheris kaj pendis senmovaj sur la ĉielo. Post momento, ekaperis sur la surfaco de la vojo densaj kavpunktoj kaj en la vasta kaj densa kotonkamparo apud la vojo aŭdiĝis fortaj gutbruoj.

4. Kiam la junulo marŝis antaŭen kun ĝojo, subite la ĉielo mallumiĝis. Jen svarmo da insektaĉoj jetiĝis al la junulo. “Fi! Ĉu malgrandaj insektaĉoj povas malhelpi min!” li diris kun ekrido, kaj blovante fortan spiron mortigis ĉiujn la venenajn insektojn.

5. Post longtempa penado, fine la junulo atingis la Tritikarbaron kaj vidis la oran fenikson kantantan malproksime sur la Grenmonto. La junulo antaŭeniris singardeme por ne fortimigi la oran fenikson per frapiĝo kontraŭ tritiko.

6. La junulo eliris el la Tritikarbaro kaj grimpis sur la Grenmonton pripensante kiel “agi lerte kaj ĝustatempe”. Kaj jen li surrajdis la oran fenikson. Kiu estas la kapbla junulo? Li estas la fama “Popola Komunumo”.



“Ah, la malbenita ĉielo jen vere malicas kontraŭ mi, la *maljuna patrino*,” laŭte kriis La-jue, kvazaŭ por ke la ĉielo aŭdu ŝin.

La du virinoj ekhaltis, kaj forbatinte la polverojn de sur siaj vestoj kaj vindinte sian hararon per viŝtuko, komencis kuri pli rapide en la direkto al la vilaĝo kuŝanta antaŭ ili. La vilaĝo estis jam proksima. La kokoj ĉe ĝia strاتفينو estis jam malklare videblaj. En la nigreverda arbaro ekster la vilaĝo flirtis la ruĝa flago de l' junula sturmbrigado, ankoraŭ tiel freŝa kiel antaŭe.

Kiam ili kuratingis la vilaĝon, iliaj brovoj estis jam malsekigitaj de la pluvakvo kaj la vojo ekkotiĝis. Tirante la manon de Vu Ŝu-lan, Ĝang La-jue eniris en pordeton parte ombritan de robinio*. Antaŭ ol alveni al la pordo de la domo, ŝi jam laŭte kriis internen; “Panjo, venu bonvenigi gaston, venas al ni honora gasto!”

Unue elkuris kelkaj infanoj, kiuj konkure sin ĵetis al la gamboj de La-jue. Ŝi tenis per ambaŭ manoj la vizaĝon de l' plej juna knabino, forte kisis al ŝia vango kaj poste svingis sian manon al la infanoj, dirante: “Foriru! Ĉiuj reiru hejmen! Kial vi elvenas sub la liberan ĉielon dum tia pluvego!”

Tiam elvenis la bopatrino de Ĝang La-jue. Streĉante sian vidpovon el la sulkiĝintaj palpebroj, ŝi ameme rigardis la alvenintojn kaj diris: “Dum tia pluvego vi devas ie vin ŝirmi! Vidu, kiom tramalsekigite! Tuj envenu!”

Kiam ili eniris la domon kaj demetis la pakajojn, La-jue prezentis Ŝu-lan al la bopatrino: Panjo, jen estas mia bona nov-amikino. Divenu, kiu ŝi estas!”

Alproksimiĝinte kelkajn paŝojn, la maljunulino atente rigardis Ŝu-lan kaj diris kun rido: “Tiom da kamaradinoj kaj amikinoj vi havas, kiel mi povas rememori ĉiujn!”

“Ŝi estas tiu, kiun mi ofte menciis lastatempe. Ŝi apartenas al la Dua Suda Kooperativo.”

La maljunulino meditis momenton kaj subite diris kun ĝojo:

“O, mi jam eldivenis! Ĉu ŝi ne estas Vu Ŝu-lan?”

“Trafe vi divenis, mia maljuna onklino,” ridante diris Ŝu-lan.

La maljunulino diris ridante: “Estu singardema, se vi amikiĝas kun nia La-jue, ĉar ĝismorte ŝi malamegas vin.” Fininte la parolon, ŝi palpepaŝe iris por prepari teon.

KONTENTO

IU renkontis survoje sian feiĝintan amikon. Eksciinte lian malfacilon en vivo, la feo montris per fingro al briko sur la vojo, kaj ĝi fariĝis ora briko, kiun li donacis al sia amiko. La lasta, tamen, ne estis kontenta. La feo ankoraŭfoje etendis sian fingron, ĉi-foje al granda ŝtonleono, kiu tuj fariĝis ora leono. La oran leonon li ankaŭ donacis al sia amiko. Sed la amiko ankoraŭ ne kontentiĝis.

“Kiel mi kontentigu vin?” demandis la feo.

La homo, post iom da ĉirkaŭfrazado, finfine diris: “Mi volas havi vian fingron!”

“Mi ankaŭ kapablas ‘malamegi’, maljuna onklino!” respondis Ŝu-lan gaje. Ŝi ĵetis rigardon al La-jue, kiu dume serĉis sekajn vestojn kaj faris grimacon al ŝi.

En la sama momento enpaŝis en la domon, iu altkreska, larĝfrunta, aplomba viro tridekelkjara, demetante de sia kapo grandan pajloĉapelon. Antaŭe Vu Ŝu-lan jam vidis lin en iu kunveno de l' ĥiang-o, sed ŝi ne supozis ke li estas la edzo de Ĝang La-jue. Ekvidinte Vu, li tuj diris: “De malproksime mi jam rimarkis, ke iun akompanas La-jue, kaj konjektis, ke tiu devas esti nepre vi. Tre bone ke vi venis, ĉar multaj ĉi tie volas propraokule vidi, kia estas la persono kiu venkis nian Kvaran Sudan Kooperativon.”

“Ŝparu vian sensencaĵon!” interrompis Ĝang La-jue.” Rigardu, tiom malsekaj oni estas, kaj vi ne rapidas unue alporti fajropelvon, ke oni sekigu la vestojn!”

“Jes, jes, mi tuj iros.”

Ŝu-lan miroplene rigardis Ĝang, kiu grimace palpebrumis al ŝi, kvazaŭ dirante: “Jen tia estas ĉe ni. Vidu, kiel obeema li estas!” Post ne longe, ŝia edzo alportis pelvon kun flamanta fajro.

Forlasonte la ĉambron, li ekhaltis kaj diris al La-jue: “La stultulinoj de via brigado nun kunvenas en la hejmo de Jin-va kaj jam plurfoje venis por trovi vin. . . .”

“Mi jam scias,” diris La-jue. “Ĉar mi sendis al ili sciigon hodiaŭ matene.”

Poemoj de Prezidanto Maŭ Ze-dong

Naĝado trans Jangzi-riveron

La akvon de Ĉangŝa mi ĵus trinkis
Kaj fiŝoj de Vuĉang jen estas sur
La tabl'. La riveregon mi transnaĝas fluge,
Dum la ĉielo de Ĉu¹ etendiĝas antaŭ l'
okul'.

Spite al la ventpelo kaj ondbato, estas
Ja pli agrable ol promeni en la korto,
Jen por mi de la senzorgec' plezur'.
La majstro² diris foje ĉe rivero:
"Tiel forpasas ĉio en vetkur'!"

Surakve glitas veloj, kaj trankvile
Kaŭras la montoj Testud' kaj Serpento.
Jen grandioza plano de l' estonto:
Leviĝas super prafosego imponanta ponto,
Cetere ŝtonan muron ni starigos tie
Forbari l' nubon kaj la pluvon de Vuŝan³,
Kaj ekaperos glata lag' ĉe l' kruta
intermonto.

Eble bonfarta restas la diino⁴,
Ŝi miros pri l' transformo de la mondo!

Tradukis Xu Sheng Yue

1. Antikva regno kies teritorio ampleksis ĉefe la nunajn Hunan- kaj Hubej-provincojn, kie troviĝas la urboj Ĉangŝa kaj Vuĉang.
2. Konfucio.
3. Kruta montaro tra kiu Jangzi-rivero trafluas.
4. Diino de Vuŝan, kiu estas nubo matene kaj pluvo vespere.

"Jen estas en ordo," diris la edzo kaj foriris mallevente la pordan kurtenon.

Ŝanĝinte la veston, La-jue diris al Ŝu-lan: "Kusigu sur la lito kaj iom ripozu! Mi eliras momenton kaj revenos tuj."

"Okupu vin sengene!" diris Ŝu-lan.

Ĝang sin turnis kaj eliris. La bopatrino atentigis ŝin el la kuirejo: "Ne forestu tro longe! Tuj revenu por vespermanĝi!"

Tri Poemetoj

I

Ho montoj!
Transpasas ni galope, sen descendo de la
sel'.

Ekretergard' kun miro:
Nur tridek tri kolorojn sub la ĉiel'.*

II

Ho montoj!
Ruliĝas, ŝaŭmas kvazaŭ la ondegoj de la
mar'.

Dekmilo da ĉevaloj
Ĵetiĝas kvazaŭ en intenson de batal'.

III

Ho montoj!
Trapikas via kling' la bluan volbon sen
rompiĝ'.

Se vi ne ĝin subtenus,
Ekfalus la ĉielo kun vertiĝ'.

* Ekzistas jena popolkanto:

Supre estas Monto de Skeletoj,
Sube estas Monto de Trezoroj,
Tridek kaj tri kolorojn superkape estas la
ĉielo:
Ĝin pasante, la piedirantoj devas kapon
klini,
Kaj rajdantoj devas descendi de la selo.

Rim. de la aŭtoro.

"Bone!" Venis la voĉo de La-jue de ekster la pordo.

La maljunulino alportis teon al Ŝu-lan kaj daŭre ŝin laŭdis, kaj fine ankaŭ sian bofilinon: "En laboro tri aŭ kvin ordinaraj viroj ne povas egali al nia La-jue unuopa. . . Ne juĝu laŭ ŝia aspekto rapidema. Jes, ŝi estas tiel elparolema, tamen ja atentema kaj zorgema. Ĉiuj najbaroj diras, ke ŝi estas pli mia propra filino ol bofilino."

“Tuj kiam mi envenis la domon,” Ŝu-lan diris ridante, “mi jam rimarkis, ke regas en via domo plena harmonio.”

Kiam la maljunulino estis ree en la kuirejo por pretigi vespermanĝon, Ŝu-lan revestis sin per sia vesto ĵus sekigita kaj zorgeme faldis tiun, kiun La-jue pruntis al ŝi, kaj ĝin metis sur la vestkesto. Levinte la pordan kurtenon, ŝi ekrigardis al la ĉielo. Ĝi malheliĝas kaj pluvakvo fluadas laŭ la tegolsulkoj sur la tegmento. Subite ŝin kaptas maltrankvilo — kiel bone estos, se ŝi reiros hejmen tiun vesperon, ĉar ŝi ankoraŭ povos okazigi brigadan kunvenon por tuj distavisti la spertojn, kiujn ŝi lernis en la Orienta Hiang. Kaj plie ŝi maltrankviliĝis precipe pro la foresto de la “sturma batalantino”, kiu jam sendis vortojn hejmen por kunvoki kunvenon, eĉ kiam ŝi mem ankoraŭ estis aliloke. Ŝi pensis, ke Ĝang devas esti nun faranta raporton. Tiel, do, denove ŝi faris unu paŝon pli antaŭen. Subite Ŝu-lan ekmemoris, ke ŝi tuŝis ion sur la kestokovrilo similan al flago, kiam ŝi metis tie la veston. Tuj ŝi reiris al ĝi, kaj ĝin etendinte trovis, ke estas ĝuste la flava flago, sur kiu troviĝas la du vortoj “Meze Bona”. Tiun ĉi flagon ŝi bone konis, ĉar ĝi iam pendis en ŝia kooperativo dum sufiĉe longa tempo kaj nur post tre peniga laborego ŝi sukcesis nun interŝanĝi ĝin al Ĝang La-jue. Ŝi ekdemandis la maljunulinon tra la fenestro: “Onjo, kial la flago estas metita ĉi tie, anstataŭ pendi en la oficejo de la brigada komitato?”

La maljunulino ekridis: “La-jue ne permesis ĝin pendigi. Ŝi diris, ke ĝi ne estas nia flago kaj ni nur konservos ĝin por dek tagoj aŭ duonmonato. Kial ni pendigu ĝin, kiun ni redonos tre baldaŭ al aliuloj?”

“O, estas tial,” diris Ŝu-lan. Ŝi faldis la flagon kaj remetis ĝin al la antaŭa loko. Ŝi pensis en si: “Nu, franjo Ĝang, al kiu vi intencas ĝin redoni!” Senintence ŝi elpaŝis el la domo kaj, starante sub la tegmentrando, elrigardis tra la pordo, la kamparon, sur kiu etendiĝis grizverdajo en nebulo. “Kia abomeninda vetero!” Ŝi

revenis en la domon, kaj ankaŭ ŝia koro pleniĝis de vento kaj pluvo. Denove ŝi pakis sian pakajon kaj firme laĉis la ŝuojn.

Tiam revenis Ĝang La-jue. Malantaŭ ŝi sekvis aro la virinoj, kiuj venis por vidi Vu Ŝu-lan. Subite vigliĝis la atmosfero en la ĉambro. La-jue laŭte plendis pro la mallumeco. Kiam la lampo estis lumigita, ŝi prezentis la alvenintojn unu post la alia al Ŝu-lan. Kvankam Ĝang estas he-ho-ulino, tamen ŝi estis ankaŭ tre atentema. Rimarkinte la malkvietan mienon de Ŝu-lan, ŝiajn ŝanĝitan veston kaj ordigitan pakajon, La-jue tuj komprenis, ke Ŝu-lan estas nun tro maltrankvila por resti plu en ŝia hejmo. Sed ŝi tiom deziris la restadon de Ŝu-lan, ke ŝi deklaris: “Hodiaŭ ni bone interkonatiĝu kaj libere interbabilu. Neniu menciuj aferojn, kiaj konkuro, ktp. Ĉu bone?” Ĉiuj respondis, “Bone!”



Petro Poliŝĉuk (USSR):

Al Niaj Ĉinaj Fratoj

I

*Neniu neniam nin povos disigi,
Ĉar estas ni fratoj eternaj!
Neniu neniam nin povos nuligi,
Ĉar estas ni forto moderna.*

II

*La sento amika la korojn varmigas,
La sento frateca por ĉiam nin ligas,
La sento de l' amo, de l' Am' reciproka,
Plenigas l' aeron de nia Epoko.*

III

*Sed estas ankoraŭ la fortoj malbonaj —
La kapitalistoj — la reĝoj senkronaj.
Atente, do fratoj, ni ĉirkaŭrigardu!
Estonton, Feliĉon de l' monstroj ni gardu!*

IV

*Kuraĝe antaŭen! Atendas nin gloro!
Laboru konscie, laboru fervore!
La fortojn kruelajn forjetu abismon
Kaj regu en mondo la Socialismo.*

Ŝu-lan jetis straban rigardon al La-jue kaj sin turnis al la aliaj virinoj: "Pro kia urĝa afero vi kunvenis en tia horo?"

Iu naiva knabino rapideme respondis: "Ni interkonsiliĝis, kiel ni konkuru kontraŭ vi, franjo Ŝu-lan."

"O, kia estas la rezultato de l' interkonsiliĝo?" Ŝu-lan demandis interesite la knabinon. Ĉiuj apudaj virinoj okulsignis al ŝi kaj La-jue eĉ muĝis je ŝi. Sed la knabino ne povis reteni plu sian ekscititan emocion kaj ŝiaj vortoj eljetiĝis kiel kugloj de maŝinpafilo: "Franjo Ŝu-lan, vi forprenis nian ruĝan flagon kaj intersanĝe donis al ni tiun flavan flagaĉon. Ni ĉiuj forte indignis. Nia nuna slogano estas: La Duan Sudan Kooperativon ni "hufpremu", kaj kune Liu-, Jan-vilaĝojn; la ruĝan flagon reprenotan ni por ĉiam tenu."

"Ej ja, vi ja volas "hufpremi" nin?" demandis Ŝu-lan.

"Sendube!"

"Eble neeblas?"

"Ni provos!" diris la knabino necedeme.

"Nepre?"

"Nepre!"

"Ne ŝanĝeble?"

"Ne!"

"Nu, provu nin hufpremi! Ni certe devigos vin 'kapitulaci kune kun la ĉevaloj.'" Parolante kaj ridante stariĝis Ŝu-lan, el kies kvietaj okuloj elradiis volo firma kaj fortika.

Ridante Ĝang La-jue ekkriis: "Mi jam diris, ke ni ne parolu pri tio, sed jen vi revenas al tia afero. Ĉu vi ne scias lasi franjon Vu ripozi, ŝi estas nia gasto hodiaŭ."

"Mi jam bone ripozis," diris Vu ridante. Samtempe ŝi montris al la flago sur la vestokesto kaj demandis: "Kial vi kuŝigis la flagon tie, franjo Ĝang?"

La-jue respondis senpripense: "Ni intencas ĝin redoni al iu alia."

"Al kiu?" demandis Ŝu-lan.

Nun La-jue trovis, ke ŝi mem enmiksiĝis en la disputado. Post momento ŝi ekridis kaj diris: "Hej, franjo Vu, pripensu, al kiu ni povus ĝin redoni. Ĉu ni dezirus ricevi la nigran?"

Ŝu-lan ridis dirante: "Do estas konsilinde, ke vi pendigu la flagon. Ni estas bonaj amikinoj. Vi scias mian koron. Mi absolute ne intersanĝos la nian por la via!"

"Tamen decidus ne via volo!" diris La-jue.

"Do kies volo, se ne la mia?" diris Ŝu-lan fiere.

"Vi forgesis nian trupon!" ankaŭ memrespekte diris La-jue.

Ekpreninte sian pakajon, Vu Ŝu-lan respondis ridante: “Franjo Ĝang, revu laŭ via plaĉo, sed mi devas reiri hejmen por demandi, ĉu miaj batalantinoj cedos aŭ ne.”

La koro de Vu Ŝu-lan, ekbruligita de la flama pasio al konkuro, jam de longe flugis al ŝiaj brigadanoj, al la kamparo. Malgraŭ ke Gang La-jue kaj ŝiaj brigadaninoj provis ŝin restigi per ĉiuj rimedoj, ili ne sukcesis.

Fine Ĝang senhelpe riproĉis: “Nun mi ekkonas, ke vi estas la plej granda aĉulino en la mondo!” Kvankam ili kunestis nur unu tagon, ilia amikeco estis jam tiel sincera kaj profunda. Estis kompreneble, ke Ŝu-lan volis foriri, ĉar ŝi deziris utiligi tiun ventopluman vesperon, kaj lasi la vesperon forpasi senfare estus perdo ne revenigebla. Tion ankaŭ Ĝang La-jue bone komprenis, alie ili ne fariĝus tiel intimaj amikinoj. Finfine ŝi povis nur diri: “Nu, jam mallumiĝis kaj la vojo estas kota kaj malfacile irebla. Hiu-ĵing kaj mi akompanu franjon Vu por kelka distanco.” Tiun proponon Ŝu-lan ne sukcesis rifuzi.

La bopatrino de La-jue prunteprenis de najbaroj kelkajn ombrelojn kaj alportis ankaŭ malgrandan kontraŭventan lanternon, por ke La-jue kaj Hiu-ĵing ĝin uzu sur la revena vojo.

Ekster la vilaĝo, estis iom pli hele sur la vasta

* *Robinio* — arbo el familio de legumenacoj (*robinia pseudo-acacia*).

kamparo, sed la ĉirkaŭaj vilaĝoj jam droniĝis en la ventopluma krepusko. Sur la kamparo, tie kaj tie, laboris ankoraŭ produktaj brigadoj en la pluvo.

Trad. Pandiŝo



Himno al la Kamparo Lignogravuraĵo de Ju Ven

AGRIKULTURA EKSPozICIO

Inaŭguriĝis en Pekino jarkomence senprecedence granda Tutlanda Agrikultura Ekspozicio en Ĉinio. Oni povas rimarki en tiu ĉi ekspozicio la brilajn sukcesojn de nia agrikultura produktado en 1958. La areo de la ekspozicio ampleksas pli ol 20 mil kvadratajn metrojn. Ĝi estas dividita en 11 grandaj fakoj: agrikulturaj plantoj, industrio en la kamparo ktp., ĉiu kun kelkaj subdividoj, ekz-e: en la fako de metodoj por altigi agrikulturan produkton oni trovas subfakojn de irigacio, sterkoj, grundoj, semoj, densa plantado kaj prizorgo de la plantoj.

Krome estas ankaŭ vasta placo kun areo de ĉ. 10 mil kvadrataj metroj por demonstracii diversajn novajn instrumentojn por agrikulturo.

ĈINA KAJ JAPANA VESPERO EN ĈEĤOSLOVAKIO

La 29-an de oktobro lastjare okazis en E-Klubo de Praha, **Vespero de Parafrazoj el ĉina kaj japana poezioj**. La programo enhavis precipe poemojn pere de Li Bo, Du Fu, krom ceteraj ĉinaj verkistoj, plue japanajn utaojn, hajkojn kaj fabelon pri Uraŝima Taro en ritma prozo, libere rakontata.

Recitis Eva Seemannova, akompana vorto kaj tradukoj de Jojko Staněk.

Oni preparas ankoraŭ vesperojn de poeziaĵoj hindaj, ciganaj, nigrulaj (el Usono) ktp. Tiamaniere intencas E-Klubo en Praha propra-rimede kontribui al interkonatiĝo kaj alproksimiĝo de orienta kaj okcidenta kulturoj.

Verda Vesperto

La interesigo de francoj pri Ĉinio

Sube estas letero de nia franca amiko Roger Lallemand, kiun ni tradukis en ĉinan lingvon kaj montris al certaj organizaĵoj en nia lando. Kaj ni sukcesis per tio interesi ilin al nia afero peresperanta. Oni promesis al ni liveri fotojn kaj aliajn objektojn taŭgajn por montri al similaj kunvenoj kiel aluditaj en la suba letero, se aliaj eksterlandaj amikoj pretos organizi tiajn kunvenojn. Ni petas niajn amikojn konsideri la aferon kaj profiti la okazon por labori unuflanke por internacia konatiĝo aliflanke por Esp-a movado. Se prosperos al ni la laboro, multe ni akiros por la prestiĝo de Esp-o tiel en via lando kiel ankaŭ en la nia.

Ĉar la kvanto de liverotaj materialoj estas limigitaj, ni kompreneble povos sendi ilin nur al tiuj kiuj efektive povas plej efike ilin utiligi.

La Red.

Karaj kamaradoj!

Antaŭ unu jaro, mi estis en via lando!

De kelkaj tagoj, mi estis vizitinta la unuan kunvenon de via Esperanto-Ligo kaj havis la honoron, la 30-an de aprilo, 1957, publike paroli al vi ĉiuj.

Kun emocio mi rememoras tiun tagon, kaj la semajnojn dum kiuj mi vizitis Ĉinion.

Kaj okazis al mi stranga afero: ne nur mi ne perdis la memoron de tiu neforgesebla tempo, sed mi min sentas pli kaj pli ligita al miaj ĉinaj amikoj.

Kiel? Tial ke mi iras de loko al loko, de unu jaro, por konigi Ĉinion al francoj. Tio estas tre kurioza afero por ili, kredu ĝin!

Unue mi pendigas al la muroj de la kunvenejo almenaŭ dudekon da kartonoj kun landkarto de Ĉinio, pejzaĝoj, teksitaj pejzaĝoj, kaj portreton de

Ĝou En Laj, represaĵoj de ĉinaj pentraĵoj, mirindaj detranĉitaj paperoj, koloraj bildoj de la unua de majo 1957 ktp.

Kiam alvenas la publiko, aŭdiĝas per magnetofono, bela sed por francoj stranga muziko, kunprenita al Francio de la delegitaro.

Poste la ĉeestantoj vidas la ĉinan filmon: "La Akrobatoj" de la Pekina Cirko, kies muziko estas ankaŭ tre bela.

Ni ankaŭ projekcias miajn kolorfotaĵojn... komentariataj.

Poste, mi bruligas ĉinan parfumon, kiu iras de mano al mano en la tuta ĉeestantaro... .

Fine, mi prezentas Ĉinion, dum duon-horo. Kaj mi petas fine ke oni al mi diru precizajn demandojn, al kiuj mi respondas.

NORDA PRISMO

Esperanta gazeto

**Kultura — Socia — Literatura —
Riĉe ilustrita**

aperas ĉiujare per 5 48-paĝaj numeroj

Redaktoro: D-ro Ferenc Szilágyi

Prezo: 10: sv. kr. aŭ 2 us. dol.

15 resp-kuponoj aŭ 30 steloj

Adreso: Norda Prismo, Barnhusgatan 8,
Stockholmo, Svedlando



Tiel, denove, morgaŭ kaj postmorgaŭ mi iros ankoraŭ prezenti novan Ĉinion, kaj estos la 27-a kaj 28-a prezentadoj! Poste mi devas ankoraŭ fari aliajn, en fino de majo kaj en novembro.

Tiacele, mi devas pli kaj pli legi pri via vivo, kiu tiel rapide evoluas. Mi legas la franclingvan revuon "Ĉinio" kaj vian karan esperantan "El Popola Ĉinio" pri kiu mi ege gratulas vin!

Kaj tiel, pli kaj pli, Ĉinio fariĝas mia dua patrujo. Tio eĉ ne estis pensebla antaŭ du jaroj, kiam komencis temi pri mia vojaĝo.

Nun, karaj amikoj, unu fojon ankoraŭ mi vin multe dankas pri ĉio kion vi faris por ni francoj, pri viaj mirindaj sukcesoj kaj pri la ega kaj efika laboro por la paco.

Ni komprenas ke ni francoj, kiuj nun suferas pri milito (mia filo eble baldaŭ soldatiĝos!), tre multe ŝuldas al viaj klopodoj por la progreso kaj por la Paco.

Tial mi konsideras mia devo la laboron kiun mi povas fari por konigi Ĉinion al francoj.

Ĉie estas tre kora la akcepto, kaj neniam oni diras al mi malamikajn parolojn pri via Lando. Grava evoluo ja fariĝis en la mensoj de ĉiuj personoj en Francio, eĉ la malpli progresemaj. Sed ofte aŭskultantoj estas tre mirigitaj pri la simpla vero (nenia mizero ekzemple, kiam ĉe ni mem en Parizo malriĉuloj dormas ekstere!). Kaj tiuj al mi diras sian miron kaj ĝojon.

Jen, geamikoj, kion mi volis al vi diri post unu jaro.

Gekamaradoj miaj, kiam ili min renkontas, al mi diras:


"Nu, vi la ĉino, kiel vi fartas?..." Mi tre ĝojas pri tiu ŝerco, kiu revivigas en mi tiom da afableco kaj kuraĝo, kvazaŭ gloro esti nomata ĉino!

Mi finu asertante vin, ĉiuj ĉinaj esperantistoj, ke tre multaj francoj ĝojas pri via porpaca agado kaj al vi deziras grandajn sukcesojn kaj senĉesan plibonigon de via vivo.

Tutamike via
Roger Lallemand

Pejzaĝo sur Li-rivero

Foto de Tan Ĝi-kiang



PRINTEMPA ORKIDEO

Fotoj de Giang Ki-ŝeng


PRINTEMPA orkideo estas populara nomo de *Cymbidium virescens*, speco de orkideo. Ĝi estas transjara herbo, kaj unu el la plej ŝatataj floroj de la ĉina popolo jam de plej frua epoko de ĉina historio. Antaŭ tri mil jaroj, Kju Juan, la granda patriota poeto, en sia fama poemaro "Ĉu Ci" jam skribis pri ĝi. En aliaj klasikaj literaturaj verkoj ĝi estis ankaŭ multe kantata de la poetoj.

Printempa orkideo ofte kreskas en densa arbaro sur deklivoj de altaj montoj. Ĉiujare, ĉirkaŭ la komenco de aprilo ĝi plene floras en la montaro. Nun oni ĝin ĝuas ne nur kiel sovaĝan kreskaĵon sed ĝi fariĝis jam de antaŭ tri cent jaroj vaz-

plantita floro, bela ornama kreskaĵo en la hejmo. Ĝi estas favorata en la regionoj sude de Jangzi-rivero, precipe en la grandaj urboj ekz. Ŝanghajo kaj Hangĝoŭ en Ĝegiang-provinco.

Krom ĝia freŝa bonodoro, la floroj de printempa orkideo sin distingas de la aliaj floroj ankaŭ per tio, ke ĝi havas diversajn specojn laŭ koloroj kaj formoj. La plej ordinaraj estas tiuj, kies petaloj similas al la bambu-folioj. Inter la raraj specoj oni trovas specojn, kies petaloj similas al multaj floroj, ekz-e prunfloro, narciso kaj lotuso. La plej kuriozaj estas "Orkideo kun papili-petaloj". Estas ĉirkaŭ 40-50 specoj da orkideoj kutime plantataj





vintro estas 3 gradoj super la glacia punkto de C. termometro, kio tre taŭgas por kresko de printempa orkideo. Tial en la nordo ĝi estas tre rara, ankaŭ la plantado estas iom malfacila.


La plantado de printempa orkideo en vazo estas laboro pli delikata ol tiu de aliaj floroj. Ĝi postulas delikatajn zorgojn kontraŭ prujno kaj neĝo dum aŭtuno kaj vintro kaj ŝirmadon kontraŭ tro forta sunradio en somero. La tero en la poto devas esti malkompakta por ke superflua akvo povu facile eliĝi kaj ĉiam restu en taŭga humideco. Ĝi bezonas ankaŭ freŝan aeron. Krome oni ankoraŭ devas ĝin protekti kontraŭ fumo de karboj. Alie ĝi velkiĝas. Por la akvumado oni devas uzi sensalan akvon, kaj en la regionoj sude de Jangzi-rivero oni kutimas uzi pluvakvon. Observante tiujn spertojn oni facile sukcesos en la plantado de printempa orkideo.

Orkideoj: Song-dinastia Prunfloro (maldekstre), Papilio (supre) kaj alia rara speco (sube)

en Ĉinio, el ili la plej multaj (pli ol duono) estas tiuj kun prunfloraj petaloj.

Orkideo abunde kreskas en la regionoj sude de Jangzi-rivero en la provincoj Siĉuan, Gujĝoŭ, Hunan, Hubej, Ĝegiang, la sudaj partoj kaj montaj distriktoj de provincoj Giangsu kaj Anhuj.

La kaŭzo de la abunda kreskiĝo de printempa orkideo en la regionoj sude de Jangzi-rivero kuŝas en tio ke en tiuj regionoj la meza temperaturo dum



Filatelio en Ĉinio

LA poŝtmarkoj de la nova Ĉinio altiris intereson de multaj fremdlandaj filateliistoj. Iu franca amiko unuafoje ricevis de mi ĉinajn poŝtmarkojn, kaj tuj ravite de la belaj desegnaĵoj skribis al mi: “Antaŭe mi kolektis nur japanajn poŝtmarkojn. Ekde nun mi kolektos ankaŭ ĉinajn poŝtmarkojn.” Multaj filateliistoj interesiĝas pri ĉinaj poŝtmarkoj pro iliaj delikataj kaj vivplenaj



bildoj kun altkvalita gravuro kaj preso kaj karakterizitaj per nacia stilo. Ilin interesas cetere ankaŭ tio, ke helpo de artaj figuroj kaj bildoj sur la ĉinaj p.m. ili povas rimarki


gravajn okazintaĵojn en la vivo de la ĉina popolo, ĝiajn atingantaĵojn en ekonomia konstruado, longdaŭran kulturen tradicion, riĉajn inventaĵojn kaj ardan amon al la paco.

De post la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko en la jaro 1949, la ĉina popola poŝto jam emisiis, krom la serioj por loka uzado, 86 seriojn da memorigaj kaj specialaj poŝtmarkoj, konsistantaj el 314 pecoj, ĝis la jarfino de 1958. Ĉi tiu kvanto superas la sumon de tiuj emisiitaj dum la antaŭaj pli ol 70 jaroj ekde la emisio de la unua ĉina poŝtmarko en 1878.



Nun, en Pekino, estas konstruata granda poŝtmarka presejo, kiu ebligas al la ĉina poŝto emision de pli multe da diversaj belaj multkoloraj poŝtmarkoj.

Por kontentigi la bezonon de la grandnombra filateliistaro, funkcias en Pekino Ĉina Filatelia Kompanio ekde 1958. Ankaŭ en poŝtoŝtancoj de aliaj urboj instaligis filateliejaĵojn, kiel parto de la oficialaj laboroj de poŝtoŝtancoj.



En multaj oficejoj, armeaj trupoj kaj lernejoj aktivigas filateliejaĵojn. Ili ofte okazigas poŝtmarkajn ekspoziciojn kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kun eksterlandaj filateliistoj. La filatelio en la nova Ĉinio ne celas komercan profiton, nek kontentigon al strangaĵoj, por ĉasi presajn aŭ aliajn erarojn kaj mankojn de poŝtmarkoj. Sana filatelia stilo estas formiganta en Ĉinio. Multaj laboristoj, kamparanoj, soldatoj, junaj lernantoj kaj oficistoj alte ŝatas poŝtmarkojn de la patrolando, ĉar per ĉi tiuj poŝtmarkoj ili povas informiĝi pri novaj progresoj de la patrolando en socialisma konstruado. Ili ankaŭ ŝatas bonajn poŝtmarkojn de fremdlandoj, kiuj povas konigi al ili la kulturon, vivon k.t.p. de aliaj popoloj.


En la sama jaro, ekde la fondiĝo de la Ĉina Filatelia Kompanio en Pekino komencis aperi la filatelia monata gazeto “Filatelio”, kiu konigadas al siaj legantoj interesajn novaĵojn kaj sciojn pri enlandaj kaj fremdlandaj poŝtmarkoj kaj pri diversaj filateliejaĵoj. En 1956 ĝi publikigis du artikolojn rilate al Esperanto — “Poŝtmarkoj memorigaj al Esperanto” kaj “Esperanto kaj Filatelio”. Ĉi tiu gazeto estas tre ŝatata de filateliistoj kaj ĝia eldona kvanto estas nun proksimume 40,000 ekz.



Sur ĉiuj memorigaj kaj specialaj poŝtmarkoj de Ĉina Popola Respubliko estas presitaj indikoj, kiuj helpas ekkoni la detalojn de la koncernaj poŝtmarkoj. Ekzemple sur la suba rando de iu poŝtmarko presigatas:

紀 34.2—1 (128) 1955

La maldekstra “紀 34.2-1” indikas ke ĉi tiu poŝtmarko apartenas al la 34-a serio de ĉinaj memorigaj poŝtmarkoj (la ideografiaĵo “紀” signifas “memoriga”-n); la serio konsistas el 2 ekzempleroj kaj ĝi estas la unua. La dekstra “(128) 1955” signifas ke ĉi tiu poŝtmarko estas laŭvice la 128-a inter la ĉinaj memorigaj poŝt-




markoj kaj emisiita en la jaro 1955. Sur la specialaj poŝtmarkoj troviĝas la ideografiaĵo “特” (speciala) anstataŭ la ideografiaĵo “紀”. Laŭ ĉi tiuj ideografiaĵoj kaj ciferoj filatelistoj povas

facile kontroli, ĉu ili jam havas ĉiujn ĉinajn memorigajn kaj specialajn poŝtmarkojn, aŭ kiuj serioj aŭ ekzempleroj de tiaj poŝtmarkoj ankoraŭ mankas al ili.

En la lastaj jaroj la emisia kvanto de memorigaj kaj specialaj poŝtmarkoj pli kaj pli kreskas. En la jaro 1958 sole emisiĝis 23 serioj da tiaj poŝtmarkoj kaj konsistantaj el 61 specoj. Por celebri la dekan datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, emisiĝos ĉi-jare eĉ pli multe da specoj.

Pli detalajn informojn pri ĉinaj poŝtmarkoj oni povos legi el la albumo “Poŝtmarkoj de Ĉina Popola Respubliko”, kiun aperigos baldaŭ la Ĉina Esperanto-Ligo.

En tiu albumo (19 × 26 cm. pli ol 90 p.) estas reproduktitaj en originala formato ĉiuj ĉinaj poŝtmarkoj eldonitaj ekde l' fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko en okt. 1949 ĝis julio 1955, kun necesaj indikoj. Mallonga historio pri la ĉina poŝto estas aldonita.



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

600,000 libroj en buji- kaj mjaŭ-lingvoj

En 1958 sole en Gujĝoŭ-provinco eldoniĝis libroj kun eldonkvanto de pli ol 600,000 ekz. por buji- kaj mjaŭ-popoloj en iliaj propraj lingvoj. Inter ili troviĝas lernolibroj por legscio, popolaj rakontoj, kantaraj, agrikulturaj, teknikaj legajoj kaj aliaj. Tio estas la unua fojo por buji- kaj mjaŭ-popoloj en ilia historio, ke ili havas legajojn en siaj propraj lingvoj.

Braille memorata

Je la 4-a de januaro okazis kunveno por festi la 150-jaran jubileon de la naskiĝo de Louis Braille, la franca blindulo, kiu kreis la brajlan alfabeton por blinduloj. 500 blinduloj en Pekino ĉeestis la kunvenon, kiun partoprenis kaj alparolis Hie Gjue-zaj, ministro de internaj aferoj, kaj prezidanto de la Asocio por Bonstato de Ĉinaj Blinduloj, Vu

Han, vicurbestro de Pekino kaj Huang Naj (Ivan H.), vicprezidanto de la Blindula Asocio kaj malnova esperantisto. Estas raportite, ke en Pekino jam pli ol 278 blinduloj partoprenas produktadon kiuj formis 71% el la tuta blindularo, kiu havas kondiĉojn por tio kaj plejparto de la blindaj infanoj lernas en la blindulaj lernejoj. La brajla presejo presis jam kelkdek milojn da legajoj por ĉinaj blinduloj. Ĉijare oni komencos ankaŭ kampanjon por likvidi la analfabetecon inter la blinduloj.

Disetendiĝo de poŝta kaj telefona retoj

Poŝta kaj telefona retoj en Ĉinio vaste disetendiĝis en 1958. Kiel nervaro ili interligas la sennombrajn urbojn kaj vilaĝojn preskaŭ tra la tuta Ĉinio. Konferenco per telefono, antaŭe estis ebla nur en grandaj urboj kaj

dum nokto, nun ĝeneraliĝas la servo en la tuta lando tuttaga. Laŭ statistiko de la Ministerio de Poŝto kaj Telefono nove instalitaj telefonaj linioj en la lasta jaro atingis 70,000 km. Tiu ĉi nombro superas tiun de la tuta unua jarkvino. Krome nove fondiĝis pli ol dek mil poŝtoŝtandoj grandaj kaj malgrandaj. Ankaŭ la intervaloj de transportado de poŝtajoj pli mallongiĝis.

Guanghi-Gujĝoŭ-a Fervojo funkciigis

Nove finkonstruita fervojo de Liuĝou en la Guanghi-a Aŭtonomio de Ĝuang-nacio ĝis Gujĝang, la ĉefurbo de Gujĝou-provinco ekfunkciis en lasta januaro. Tiu ĉi fervojo 605 km. longa estas la ĉefa komunika linio en tiu ĉi regiono kaj interligas tiujn du provincojn kun la ceteraj partoj de la lando.

Kin-imperio*

A. Rimedoj por firmigi la landon unuigitan

La Feŭda Imperio En la jaro 221 a.K., Ĉinio estis unuigita de Kin, kiu disvastigis tra la tuta imperio la novajn politikojn aplikatajn de post la reformado de Ŝang Jang*. Oni abolis la sistemon de vilaĝa komunumo, kaj sankciis la privatan posedon de tero, kreante favorajn kondiĉojn por disvolviĝo de feŭdisma ekonomio. Kin-imperio fortigis la regadon super la provincoj, repuŝis la atakojn de hiongnu-oj el la nordo kaj ekspluatis la sudajn regionojn, kaj tiel sin disvolvis en unuigita feŭdisma imperio.

Central-izismo En la sama jaro, Jing Ĝeng, la reĝo de Kin-lando deklaris sin imperiestro. Li sin titolis la Komenca Imperiestro, kaj difinis, ke liaj sekvantoj estu nomataj la dua, tria, ktp.

La Komenca Imperiestro



La imperiestro havis la plej superan suverenan potencon. Ĉiuj gravaj politikoj kaj aferoj decidiĝis nur per la imperiestro mem, kaj liaj ordonoj devis esti rigore plenumataj.

La centra registaro konsistis el unu ĉefministro kaj unu ĉefgeneralo, kiuj helpis la imperiestron en civilaj kaj militaj aferoj respektive, kaj unu revizoro, kiu inspektas la tutan oficistaron de ĉiuj rangoj.

La Komenca Imperiestro de Kin-dinastio dividis la tutan teritorion en

tridek ses provincojn (nomata gjun) administratajn de provincestroj, kaj ĉiu provinco dividiĝis ankoraŭ en guberniojn, kies estroj kolektis impostojn kaj organizis servutojn por la imperiestro. En ĉiu provinco estis inspektoro, kiu observis la provincestrojn, kaj faradis sekretajn raportojn al la imperiestro.

Ĉiuj altrangaj oficistoj ĉu centraj ĉu lokaj estis enoficigitaj de la imperiestro, kiu povis ilin anstataŭigi kiam ajn. La centra kaj lokaj regpotencoj centriĝis en la manojn de la imperiestro.

Unuigo de Skriba kaj Mezura Sistemoj En la epoko de la Militantaj Regnoj (403-221 a.K.), la skriboj de ĉiuj landoj diferencis inter si en formo. La Komenca Imperiestro ordonis ke la ĉefministro Li Si unuigu la skriban sistemon, kiu simpligis ĝenerale uzatajn skriboformojn en Kin-lando, kaj fiksis norman formon de ideografiaĵoj nomata "hiaŭĝuan". Poste uziĝis pli oportuna alia formo de skribado nomata "lišu" kiu jam sufiĉe similas al nia nun uzata ideografio "kajŝu".

En la Epoko de la Militantaj Regnoj, ĉiuj landoj fabrikis monerojn el metaloj, en formoj tranĉila, ŝovelila, kvadrata aŭ ronda. La nova imperio unuigis la formon de moneroj en ronda disketo kun kvadrata truo por cirkuli en la tuta lando.

Anstataŭ la malsamaj mezuroj de diversaj regionoj, la imperiestro validigis unuecan sistemon por la tuta lando.

La unuigo de skriba, mona kaj mezura sistemoj ja konformiĝis al la postulo de la unuigita ŝtato.

B. Defendo kontraŭ la Hiongnu-oj kaj Eksploato en la Sudo


Detruo de Armiroj, Remparoj kaj Kons-truo de Galopvojoj La Komenca Imperiestro de Kin-dinastio alprenis multajn rimedojn por intensigi la kontroladon super la lokaj registaroj, por malebligi kontraŭstaron de la popolo. Li konfiskis de ili ĉiajn armilojn, transportigis al la ĉefurbo Hianjang (en nuna Ŝenhiprovinco) kaj tie ilin detruis. Li malkonstruigis la remparojn de la ĉefaj urboj kaj la muregojn inter la pereintaj landoj. Li konstruigis

vojojn en la tuta lando por interligi Hianjang-on kun ĉiuj provincoj. Tiuj vojoj nomiĝis "galopa" kaj estis sufiĉe larĝaj, kun tre solida surfaco, kaj ĉiam verdaj pinarboj estis plantitaj ambaŭflanke.

La Granda Muro Dum la longdaŭra batalado inter Kin kaj la aliaj ses landoj, la hiongnuoj pli kaj pli fortiĝis, kaj profitante la favoran ŝancon ekokupis la Kurbejon de la Flava Rivero, riĉan je akvo kaj herboj. La hiongnuoj, loĝantaj sur la Mongolia altebena paŝtis kaj migris kiel nomadoj. Ili sin okupis ankaŭ per ĉasado de birdoj kaj bestoj. Ili sin trudis de tempo al tempo en la najbarajn landojn por rabakiri homojn kaj bestojn.

En la jaro 215 a.K. la imperiestro ekspedis grandan armeon de 300,000 homoj kun Mong Tian kiel komandanto, por repuŝi la hiongnuojn norden de la River-kurbejo. La sekvintan jaron, oni interkunigis la apartajn muregojn ĉe la nordaj limoj de la estintaj Kin-, Ĝaŭ- kaj Jan-landoj, de Lintaŭ (en nuna Gansu-provinco) ĝis oriente de l' rivero Liaŭ (en nuna Liaŭning-provinco), t.e. la konata Granda Muro de Ĉinio, kiu serpentumas tra montaroj, kaj profundaj valoj kun longeco de 2,500 km., kaj estis la plej granda konstruaĵo de la antikva Ĉinio. Ĝi protektis la agrikulturan produktadon en la sudo de la Granda Muro, kaj defendis Ĉinion kontraŭ la atako de la nordaj nomadoj.

Ekspluato de la Sudo En la jaro 214 a.K., la Komenca Imperiestro sendis armeon el kvincent mil soldatoj por ataki Jue-ojn, kiuj disloĝis ĉe la sudorientaj bordoj de la maro kaj en la baseno de la Perlo-rivero. Tiutempe, ili troviĝis ankoraŭ en stato duone de agrokulturado, kaj duone de fiŝado kaj ĉasado, kaj uzis ŝtonŝovelojn en agrikulturado. Ili tamen obstine rezistis la atakantojn kiuj sukcesis okupi la teron de Jue-oj nur post multfoja batalado.



Diversformaj moneroj antaŭ la unuigo

Post tio la imperiestro transloĝigis grandajn arojn da krimuloj en la nove okupitan landon por ke ili kulturu la virgan teron. Bovojn, ĉevalojn kaj ferajn instrumentojn oni transportis el la regiono de nuna Hunan-provinco. Tiel la Perlo-rivera baseno ligiĝis ekonomie kun la baseno de Jangzirivero. Akceptinte la produktajn teknikojn kaj uzadon de feraj iloj en terkulturado, la Jue-oj evoluiĝis pli kaj pli.

** Pro alpreno de nova transskriba maniero de ĉinaj sonoj per esp-a alfabeto, kelkaj uzitaj formoj estas ŝanĝitaj. Bonvolu noti: Kin=antaŭa Qin, Ŝang Jang=antaŭa Shang Yang.*

Novaj Esp-aj Kursoj

Laŭ informoj ĵus ricevitaj nun en Bengpu de Anhuj-provinco, en Ŝenjang, ĉefurbo de Liaŭning-provinco organiziĝas novaj Esp-aj kursoj. Tiu en Bengpu estas gvidata de k-do Ĝu Ŝi-kjuan kaj Ju Guogian, laŭ rapida instrumetodo. Oni lernas tuttage en la printempfestoj (8-11-a feb.) kaj post la festo nur en dimanĉoj.

Tiu en Ŝenjang estas organizita de 25 gimnazianoj.

Aperis nova bildo-rakonto

"Mi Volis Viziti Lernejon" kiu prezentas parton de la aŭtobiografia rakonto de Gaŭ Ju-baŭ, kiu komencis skribi ĝin en sia 22-jara aĝo kiam li lernis legi kaj skribi, kiel 2-jara armeano en la Ĉina Popola Liberiga

Armeo. La bildrakonto temas pri lia unumonata lerneja vivo, kiun li devis kontraŭvole fini pro malriĉeco kaj pro subpremo de terposedanto. 76 bildoj kun mallongaj Esp-aj notoj vive surpaperigas ĝojon, ĉagrenon, lukton kaj bravecon de malriĉa kamparana knabo. Ĝi estas la dua bildrakonto eldonita de Ĉ.E.L. apud la Lerta Virineto kiu dume jam elĉerpiĝis.

Kurso de Ĉina Lingvo

Tomu:

SESA LECIONO

1. Kèren: Wáng xiānshēng zài jiā ma?
Gasto: Ĉu sinjoro Vang estas hejme?
2. Zhūrén: Zài jiā, Lǐ xiānshēng, shì nín?
Huānyíng huānyíng! Qǐng jìnlai.
Mastro: Jes, sinjoro Li, estas vi? Bonvenu!
Bonvole eniru.
3. Zhūrén: Ràng wǒ jièshào jièshào. Zhè shì
Lǐ xiānshēng, zhè shì wǒde qīzi (zhàngfu,
jièjie, mèimei, gēge, didi).
Mastro: Lasu min interkonatigi vin. Tiu ĉi
estas sinjoro Li, tiu ĉi estas mia edzino (edzo,
pliaga fratino, malpli aĝa fratino, pli aĝa frato,
malpli aĝa frato).
4. Kèren: Zhè sì-ge háizi dōu shì nínde shénme
rén?
Gasto: Kiu estas tiuj ĉi kvar geknaboj?
5. Zhūrén: Tāmen liǎng-ge shì dixiong, dōu shì
wǒde érzi. Zhè jiēmèi liǎngge shì wǒde nüer.
Háizimen dōu shàngxué le, hěn jìnbù, dōu shì
gòngqīngtuányuán. Wǒ hái yǒu ge dà nüer,
tā yǐjīng jiéhūn-le. Tāde háizi yǐjīng huì
zǒulù le.
Mastro: Ili du estas fratoj, kaj ambaŭ estas miaj
filoj. Tiuj ĉi du fratinoj estas miaj filinoj. La
geknaboj ĉiuj vizitas lernejon. Ili ĉiuj estas
progresemaĵ, kaj estas membroj de la Komunisma
Junula Ligo. Mi havas ankoraŭ unu plejaĝan
filinon. Ŝi jam edziniĝis. Ŝia infano jam kapabla
paŝadi.
6. Kèren: Nín shìbúshì gòngchǎndǎngyuán?
Ĉu vi estas ano de Kompartio?
7. Zhūrén: Shìde, wǒ yě shì Zhōng-Sū Yǒuhǎo
Xiéhuì de huìyuán.

Mastro: Jes, mi estas ankaŭ ano de Ĉinia-Sovetia
Amika Asocio.

8. Kèren: Qǐngwèn nínde àiren zuò shénme
gōngzuò?
Gasto: Je kio via edzino sin okupas? mi petas.
9. Zhūrén: Tā zài yíge zhōng xuéxiào (xiǎo
xuéxiào, dà xuéxiào) jiāoshū. Chīle wǎnfàn
tā hái yào dào xuéxiào qù.
Mastro: Ŝi instruas en iu mezlernejo (elementa
lernejo, universitato). Post vespermanĝo ŝi
ankoraŭ devos iri al la lernejo.
10. Kèren: Háizimen hái qù xuéxiào ma?
Gasto: Ĉu la geknaboj ankoraŭ iros al la lernejo?
11. Zhūrén: Yǒude qù, yǒude bú qù le.
Mastro: iu(j) iros, iu(j) ne iros plu.
12. Kèren: Nínde fùmǔ dōu yǒu duó dà suǐshu?
Gasto: Kiom da jaroj viaj gepatroj ambaŭ havas?
13. Zhūrén: Fùqīn shēng yú yībājiūlíng (1890)
nián, jīnnián liùshí bá suì le. Mǔqīn shēng
yú yījiūlínglíng (1900) nián, bǐ fùqīn xiǎo shí
suì.
Mastro: La patro naskiĝis en 1890, ĉijare li
havas sesdek ok jarojn. La patrino naskiĝis en
1900, ŝi aĝas je dek jaroj malpli ol la patro.

GRAMATIKO

1. Sufikso “-men” estas uzata laŭ bezono por montri pluralon, ofte post personaj pronomoj (wǒ-men — ni, nǐ-men — vi, tā-men — ili) kaj substantivoj temantaj pri homoj (tóngzhi-men — kamaradoj, xuéshēng-men — lernantoj, yīngxiong-men — herooj), kiam neniu alia vorto evidentigas ilian multnombrecon.

Sed “men” estas ne uzenda kiam la multnombrecon jam montras apudstaranta numeralo aŭ adjektivo (sānshí ge xuéshēng — 30 lernantoj). (5, 10)

2. “Le” estas uzata post verbo aŭ je la fino de propozicio por montri ke la ago aŭ stato estas jam plenumita, komencita aŭ nepre okazonta. (5,9,11,13)

3. “Líng” signifas nulon. Kiam oni legas nombron per ciferoj, ĉiu “0” estas legataj kiel “líng” (13). Kiam oni legas nombron per la nomo, kun mencio de mil, cent, dek ktp., oni diras “líng” por la nulo(j), se post tiu(j) sekvas cifero alia ol “0”; aŭ oni prisilentas se tiu(j) troviĝis ĉe la fino, ekz.: 101 — yì-bǎi líng yī, 1001 — yīqiān líng yī, 1100 — yīqiān yībǎi.

4. Ripeto de verbo kelkfoje ankaŭ adjektivo kaj adverbo esprimas intimecon, ankaŭ mildigas kaj malabruptigas la parolfluan.(2) Kiam tio okazas post vorto "lasu", ĝi sentigas modestecon de la parolanto. (3)

VORTARO

àiren — edzo aŭ edzino
bā — ok
bǐ — ol
bù — ne
chī-le — manĝinte
dà — granda, pliaĝa,
plejaĝa
dào — al
dìxiong — fratoj
dōu — ĉiuj, tute
duō — kiom?
érzi — filo
fùmǔ — gepatroj
fùqin — patro
gòngchǎndǎngyuán —
ano de kompartio
gòngqīngtuányuán —
ano de Komunisma
Junula Ligo
gōngzuò — laboro,
okupado

hái — ankoraŭ
háizi — infano
háizi-men — infanoj
hēn — tre
huānyíng — bonvenu
huì — kapabli, povi
huìyuán — ano de
societo kies titolo
finiĝas je "huì"
jiā-li — hejme
jiāoshū — instrui
jiéhūn — geedziĝi
jièshào — konatigi, in-
terkonatigi, prezenti
jìnlai — eniri
jīnnian — ĉijare
kèren — gasto
le — (v. Gramatiko 2)
liǎng — du
liǎng-ge — du
líng — nulo

liùshí — sesdek
ma — ĉu
mūqīn — patrino
nián — jaro
nín — vi (singularo en
ĝentila formo)
nínde — via
nùér — filino
péngyǒu — amiko
qǐng — bonvole,
bonvolu
qǐngwèn — peti pri
demando
qīzi — edzino
qù — iri
ràng — lasu
rén — homo
shàngxué — viziti
lernejon
shēng yú — naskiĝi en
shénme — kio, kiu
shí — dek
shì — esti
shìbúshì — ĉu esti
shìde — jes
sì-ge — kvar
suì — jaro (pri aĝo)
suìshu — nombro de
jaroj

tā; tāmen — li, ŝi; ili
wǎnfàn — vespermanĝo
wǒ; wǒde — mi; mia
xiānshēng — sinjoro
xiǎo — malgranda,
malpliĝa
xiéhuì — asocio
xuéxiào — lernejo
yào — bezoni, voli
yě — ankaŭ
yì-bǎi — unucent
yíge — unu
yījīng — jam
yǒu — havi
yǒude — iu, iuj
yǒu-ge — havi unu,
esti unu
yǒuhǎo — amikeco
zài — ĉe, je, en
zhè — tiu ĉi
Zhōng-Sū — Ĉinio-
Sovetio
Zhōng xuéxiào —
mezlernejo
zhūrén — mastro
jiēmèi — fratinoj
zǒulù — piediri, paŝi
zuò — fari

KORESPONDI DEZIRAS

* **Lerneja Esp-grupo "Verda Steleto"** deziras korespondi kun lernantoj de ĉiuj landoj kaj interesanĝi per p.m., ilustritaj poŝtkartoj, muziknotoj k.c. Adr.: Esperanta grupo "Zelenaja Zverdoĉka", 209-a ŝkola 6 kl. ul. Vostania 8, Leningrad, USSR.

* **Ĉeĥa samideano serĉas ĉinan kolegon**, kiu interesiĝas pri la tibeta lingvo kaj ĝia literaturo. Korespondado estu E-lingve, ĉinlingve aŭ tibetlingve. Adreso: Kamil SEDLAĈEK, PROSTĚJOV, Kostelecká 11, Ĉeĥoslovakio.

* **S-ro B. Brockhaus**, Wangen im Allgäu, Halstättle VK, Okc. Germanio.

* **Ivan Ĉernaev**, urbo Sliven, strato "Sofia" I, Bulgario.

* **S-anino Nadejda Krasteva**, str. E. Septembro 15, Ruse, Bulgario.

* **Bartulec Paulo**, Stonava 110, Silezio, Ĉeĥoslovakio.

* **Du fervojoficistoj** deziras korespondi kun ĉinaj kaj orientlandaj geesperantistoj, interŝ. pm. kaj bk. Adresoj: **Czirjak Eugen**, CLUJ, str. Armater Rosii 1, Rumanio. **Reitmayer George**, CLUJ, str. Horea 62, Rumanio.

* **Jura Kaŝtanov** (studento), USSR. Leningrad M-135, Gastello 16.

* **A. Dubrovin**, USSR, Galiĉ, Kostromska obl., ul. Lenina 10-a.

* **V. Romanov** (studento), Ozerkovskij pr. 17/14, kv. 1, Leningrad K-37, USSR, dez. kor. kun Francio kaj Italio.

* **Lê-kiên-Duc**, 190 str. Ba Triêu, Hanoi, Vietnamio.

* **L. Svoboda** (tramvojestoj), Slovany Jasanova 10, Plzeň, Ĉeĥoslovakio. dez. interŝ. Esperantajn artglumarkojn.

* **Miaj kursanoj** dez. kor. kun Ĉinio, Koreio, Japanio, Vietnamio, Indonezio, Afriko, Aŭstralio kaj latinamerikaj landoj. Skribu: Prof. Beier Šandor, CLUJ, salcím 12, Rumanio.

* **Atanas Danilov** Aprilov-Gabrovko, Bulgario, dez. kor. kun tuta mondo per bildkartoj.

SUR NIA LIBROBRETO

Konstruteknika Terminaro, kompilita de inĝ. K. J. Moberg, kun formato 14.8 × 21 cm. en 100 paĝoj, prezo: broŝurita 7.5 sv. kr.; en plasta specialbindo (por fakuloj) 8.50 sv. kr. Eldonita de Eldona Societo Esperanto, Box 7043, Malmö 7, Svedio.

La libro estas aranĝita en du partoj — la unua: sveda-espaa, parte kun tradukoj, ankaŭ en unu aŭ pluraj alinaciaj lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala aŭ aliaj; la dua: novaj vortoj kun esp-aj difinoj. La kompilinto enmetis novajn terminojn, kiuj aperis kun la enkonduko de novaj teknikoj, maŝinoj kaj materialoj en konstruado lastajn jarojn. Kvankam mi ne estas kompetenta koncerne fakajn aferojn, sed sincere bonvenigas la libron konsiderante ke ĝi faras novan helpon al utiligo de Esp-o en faka reala vivo, sen kio Esp-o ne povas konkeri la mondon. Ĉiuj seriozaj laborantaj esp-istoj eĉ ne fakuloj ankaŭ povos iel aŭ aliel profiti el ĝi en sia laboro. Ni esperas ke sekvos aliaj similaj terminaroj.

Tikos

Japanaj Fabeloj — dua eldono reviziita de Teru Mikami. eldonis Amo-akademio, 60 p. 18.5 × 13 cm. kun 5 koloraj bildoj. Ĝi enhavas 5 fabelojn. Ili estas interesaj por ambaŭ infanoj kaj plenaĝuloj. La ilustraĵoj estas tre belaj. Prezo: \$0.40 aŭ egalvaloro plus sendokosto. Havebla ĉe Amo-akademio, Tenmori, Kozoji, Aiĉiken, Japanio.

Teatro de Machado de Assis — Kvar komedioj tradukitaj el portugala lingvo, eld.: Brazila Esperanto-Ligo, 1958, 12.5 × 18 cm., 156 p., eldono en la 50-a jaro de la morto de la aŭtoro.

Ĉiu el la kvar komedioj estas unuakta. Ili titoliĝas: **La Protokolo**, **Ne konsultu kuraciston**, **Preskaŭ ministro**, **leciono pri Botaniko**. Krom la tria ĉiuj temas pri amindumaj aferoj. En tiuj unuaktaj drametoj la fama brazila aŭtoro el ĉiutagaj miskonprenoj kaj bagatelajoj teksis siajn verkojn. Eble oni povus el tio iom kompreni la tiaman socian vivon de Brazilo. Ankaŭ estas interese por ĉinaj legantoj, ke la aŭtoro montris al ni kiom mankis kompreno pri Ĉinio al tiamaj brazilanoj. **Preskaŭ ministro** estas komedio alispeca. Ĝi primokas la flatemulojn al aŭtoritatuloj jam antaŭ ilia potenciĝo. La lingvo estas flua kaj facile komprenebla.

Curso de Esperanto — 6-a eldono 1957, kompilis: A. Couto Fernandes kaj H. Mota Mendes, eldonis: Brazila Esperanto-Ligo, 13.5 × 18.5 cm., 92 p.

Fundamenta legolibro por portugala lingvanoj en 20 lecionoj. Ĝi estas kompilita laŭ gramatika sinsekvo kun ekzercoj simplaj kaj facile legeblaj. Ĉe la fino troviĝas vortaro enhavanta iom pli ol 1,000 vortradikojn. La plurfoja eldono pruvas la taŭgecon de la libro.

Gramatica Sinoption de Esperanto — Kompilis: Mario Titter Nunes, Eldon.: Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. 18.5 × 27 cm., 33 p., prezo: Cr\$ 30.00 aŭ 3.75 steloj.

Tute originala verko pri Esperanta gramatiko. La tuta libro konsistas el 24 tabeloj klarigantaj pri diversaj gramatikaj formoj sisteme aranĝitaj kaj kun ekzemploj. Tio ebligas la lernantojn eĉ lernontojn de Esperanto tuj ricevi klaran bildon pri E-konstruo. Ĝi ankaŭ servas al la

memoro kaj studo de Esperanta gramatiko por komencantoj. Kvankam ĝi estas destinita por portugala legantoj mi opinias, ke ĝi valoras eldonojn alilindgvajn.

Ŝlosilo Portugala — En tradicia formo nove eldonita en 1957. Krom la kutimaj enhavo en ĝi troviĝas ankaŭ paĝoj pri Esperanta movado. Ĝi do tre utilas por propagando al portugala legantaro.

El Kornvalo — Jen broŝureto kun titolo nekomprenebla sed enhavo tre interesa. 28 strofoj de Nenjo Rimanto, ĉiu kun ilustraĵo por faciligi memoron al la 28 Esperantaj literoj. Eldonis La Britia Esperanto-Asocio. Prezo: 1 ŝil., afr. 3 pencoj.

Novaj Esperantaj Gvidlibroj


Varsovio invitas vin — Bela prospekto pri la fama urbo Varsovio. 38 bildoj kun klarigoj pri la famaj lokoj de la urbo. Interesantoj, precipe tiuj, kiuj partoprenos la 44-an U. K., povas ĝin ricevi senpage de la Pola Vojaĝoficejo "Orbis" en ĉiuj landoj.

Saarbrücken — Nova gvidlibro de tiu industri- kaj lim-urbo inter verdaĵo de Sarlando. Ricevebla senpage de S-ro Jakob Schenkel, Am Ziegelhof 30 NEU-ASCHBACH/ Saar, Post Klarenthal, Germanujo.


Urbo Niteroi — Gvidlibro pri la brazila urbo, kie okazis la XV-a Brazila Kongreso de Esperanto en 1957, kun klarigoj Esperanta kaj portugala.

Wien — Kolore presita kun E-klarigo, ricevebla de Fremdenverkehrsstelle der Stadt Wien, Aŭstrio.


Ravenna — 32-paĝa gvidlibro por tiu ĉi itala urbo eldonita de Esperanto-Grupo en Ravenna. Oni povas senpage ĝin ricevi per simpla poŝtkarto al Esperanto-Grupo. P. Anita Garibaldi, 1, Ravenna, Italio.



Malmunto kaj pristudo gvidas kamarajn teknikistojn al fabriko de novaj generatoroj.




Ankaŭ la Harbin-a Gilian-Maŝin-fabriko klopodas produkti generatorojn por ekipi malgrandajn elektrejojn.



Iuj popolaj komunumoj produktas elektron per vento.

La kamaranoj en Ĉenguantun-vilaĝo celebras sian hidroelektrejeton konstruitan en 5 tagoj.



Aliaj popolaj komunumoj starigis elektran stacion sur ŝipo.

